



POLA ESPERANTISTO

Monata Gazeto por propagando de Esperanto



ESPERANTYSTA POLSKI



Miesięcznik poświęcony sprawie Języka Międzynarodowego

Julio—Aŭgusto 1911

WARSZAWA—VARSOVIO.

Jaro IV (VI) — Nro 7--8 (52--53)

Język na polskiej zrodzony ziemi...

Pomocniczy język międzynarodowy Esperanto *na polskiej powstał ziemi...* Polaków zatem powinno być obowiązkiem ujęcie w swe ręce sztandaru nowego hufca rycerzy.

Niestety! Jak pod wieloma względami, podobnie i w tym wypadku pozwoliliśmy się wyprzedzić...

Pierwszymi bowiem, co stanęli u boku Zamenhofsza szermierzami idei esperanckiej — nie licząc szczupłej garstki najbliższych przyjaciół twórcy języka — byli Niemcy, za nimi poszli Szwedzi, Rosjanie, Francuzi, Anglicy, Włosi, Bułgarzy, Hiszpanie, Czesi, Amerykanie, Turcy, Japończycy, Australijczycy i t. d... Myśmy zostali na końcu...

I dziś jeszcze, dziś, gdy tyle narodów, tyle światłych umysłów, takie niezliczone rzesze ideowców przyjęły i jakby za swoją uznały *rzuconą z ponad lanów litewsko-polskich* ideę, pracując nad jej urzeczywistnieniem, my jedni stoimy bezczynni...

— — — — —
A jednak... a jednak — *mimo to wszystko* — śmiem utrzymywać, iż mowa *na polskiej ziemi zrodzona* stanie się z czasem *pomocniczym* językiem międzynarodowym.

I będą nim mówili i ci, co nas szanują, i ci, co dotąd nas nienawidzą... Będą nim biegle władali, będą się rozkoszowali harmonją jego dźwięków, przepychem jego form, bogactwem jego

wyrażeń, będą się nim zachwycali, podobnie, jak my się nim zachwycamy, — będą się nim posługiwali przy każdej zdarzonej okazji, a miast nas za narzucenie im tego języka — przeklinać, — będą nam błogosławili...

A od północnych fjordów skandynawskich — aż do południowych wybrzeży Oceanji, od kraju Wschodzącego Słońca poprzez olbrzymie przestrzenie Azji, Europy i Afryki — aż do zachodnich krańców Ameryki — rozbrzmiewać będzie ta piękna, ukochana i błogosławiona przez wszystkich, dobroczynna *mowa na polskiej ziemi zrodzona...*

A że tak będzie, na to już dzisiaj mamy dowody...

Zarówno rodowity Japończyk, Koreańczyk lub Chińczyk, jak i mieszkaniec Kaukazu; zarówno Francuz, czy Niemiec, Włoch, Hiszpan, Czech czy Słoweniec, Szwed, Rosjanin, Grek czy Turek — jak i obywatel Stanów Zjednoczonych albo rzeczypospolitej Chilijskiej; zarówno rodowity wyznawca Konfucjusza, Buddy, Brahmy, Mojżesza czy Mahometa — jak i różni wyznawcy Chrystusa; zarówno bogaci jak i biedni, wielcy jak i mali — *dzisiaj już*, w stosunkach pomiędzy sobą, — posługują się *mową na polskiej ziemi zrodzoną...*

I odtąd corocznie przez wszystkie ludy świata obchodzonym jest i będzie dzień, w którym po raz pierwszy błysnęła w głowie Genjusza myśl — ob-

darowania ludzkości nieobliczalnym do-
tąd dobrodziejstwem...

A myśl ta zajaśniała w głowie Gen-
jusza *na polskiej zrodzonego ziemi*,
i przyoblekła się w kształt kryształu, mie-
niącego się wszystkimi barwami tęczy...

I zajaśniała odtąd nad horyzontem
polskim nowa, nieznaną dotychczas,
zielona gwiazda esperancka i wzniosła
się na najwyższy punkt nieboskłonu...

I gwiazdę tę dostrzeżono już prawie
ze wszystkich wieżyc astronomicznych
świata, gdzie się gromadzą miłośnicy
twórczości ludzkiej, szczerzy czciciele
Genjuszów i pracownicy Jutra...

A ci, co się najbliżej znajdują tego,
który tę gwiazdę na niebie ideałów ludz-
kich rozniecić potrafił — współrodacy
jego i bracia — tak są, niestety, pochło-
nięci trapiącą ich rzeczywistością, iż cza-
su nawet nie mają na oderwanie oczu od
swej ziemi i na skierowanie wzroku
swego na najwyższy szczyt nieboskłonu...

Patrząc w ziemię, nic już nad sobą
dostrzec nie potrafią...

Dwadzieścia lat temu ubolewała wielka
poetka nasza, iż gwiazdy ideałów na-
szych są „coraz bladsze“, a mgły nad-
chodzącej nocy przesłaniają nam „wszy-
stko, co Światłem jest i co jest Mocą“...

Lecz nie! Przeczucie poetki kazało
jej wierzyć, iż po przebywanej nocy
musi nastąpić dzień...

I my też wierzyć musimy, iż ogół
nasz w końcu podniesie wzrok swój ku
górze, a dostrzegając nad sobą nową
przewodniczkę rąk ludzkich *na niwie
wzajemnego zrozumienia się ludów
i pokojowego z sobą współżycia* —
dumnym będzie z pokrewieństwa i naj-
bliższego obcowania swego z tym, który
genjalną myślą wiedziony, tę nową,
szlachetną pochodnię nad głową ludz-
kości zapalił.

A jeśli ktokolwiek mówić nam bę-
dzie, iż niemożliwą jest rzeczą wprowa-
dzenie do stosunków międzynarodowych
sztucznie wytworzonego języka, jakim
jest *piękny i łatwy* język esperancki,
i jeśli w argumentacji swojej powoływać
się będzie na to, iż nie jest mu znany
fakt powstawania języków na innej, ni-
żeli naturalna, drodze, — to odpowiesz-
my mu, iż jest on reinkarnacją jednej
z tych płaskich dusz „uczonych“ pary-
skich, którzy ongi, patrząc na rzecz
już realną, odważyli się wiekopomny
wynałazek, lokomotywę, nazwać za-
bawką, a doświadczenia z tym „potwo-
rem“, z tym *sztucznie wyprodukowa-
nym* koniem, uznać za groźne dla ludzi
niebezpieczeństwo...

Albo powiedzmy mu, iż jest on wtór-
nym wcieleniem tych duchów ciemnych
i złych, które ongi Kolumbowi, gdy
ruszał w śmiałą swą podróż, rzucały
wyniosły uśmiech politowania, a nie
chcąc, czy też nie mogąc zrozumieć
Kopernika, kazały palić na stosie księgi
jego obrońców...

Wiedzieć należy, iż ten, kto będzie
obstawał przy konieczności wprowadze-
nia do powszechnego użycia w stosun-
kach międzynarodowych ojczystego ję-
zyka któregolwiek z narodów, jest albo
obcym na ziemi naszej przybyszem
i *pragnie narzucić nam panowanie
swoje*, albo jest *niewolnikiem, godzą-
cym się ze stanem poniżenia własnego
narodu*...

Wiedzieć i to należy, iż więcej wart
jest jeden moment przebłysku, zrodzony
w umyśle Genjusza, niż całe stosy za-
wodowej „uczoności“, podawanej przez
ludzi o krecich instynktach i wzroku
wypchanych ptaków...

Zygmunt Gryff.

Od Wydawnictwa.

W roku 1911 „ESPERANTYSTA POLSKI“ wychodzi regularnie, co miesiąc w nieco zwiększonej
objętości, przy rozszerzonym i urozmaiconym programie.

ROCZNA PRENUM. wynosi Rb. 2.50 z przes. poczt.; bez dodatku „LITER. JARLIBRO“ — Rb. 2.00.

Adres: WARSZAWA, Redakcja — Włodzimierska 8, Administracja — Hoża 20.

NB. Adres zmieniony!

Instruado kaj propagando de Esperanto distance.

En la Junia n-ro de l'„Ondo de Esperanto“ ni trovas tre interesan artikolon, kiun ni por eventualaj proponoj aŭ diskutoj citas ĉi-sube en mallongigo:

„Mi tie-ĉi proponas unu el la metodoj de vasta propagando, kiu estas tre simpla kaj facile plenumbla por ĉiu aparta vera esperantisto. Ĝi estas — *instruadi nian lingvon distance*. Mi estas certa, ke ĝi multe helpos nian komunan aferon, ĝi mobilizos kaj laborigos grandan anaron de niaj samideanoj, kiuj ĝis nun restas tute neagemaj.

La plej konsiderinda metodo por disvastigi nian lingvon kaj obligi nian samideanaron — estas la organizado de kursoj. Sed kursoj pro multaj kaj tre diversaj kaŭzoj ofte estas maloportunaj.

Krom tio, ili povas esti aranĝitaj nur en kelkaj grandaj urboj. Naŭdek naŭ centonoj da urboj, eĉ sufiĉe grandaj, ĉiuj urbetoj kaj vilaĝoj tute ne havas kursojn kaj ilia miliona loĝantaro, eble multe pli esperantema, ol la urbeganoj, estas preskaŭ tute ne atingebla por ni. Kiom multaj instruistoj de popolaj lernejoj en diversaj urbetoj kaj vilaĝoj studus nian lingvon, se ni ebligus al ili fari tion, restante hejme! Kiom da gelernantoj facile esperantiĝus, se iu distance, nealtrudeme gvidus ilian studadon!

Ĉiuj malfacilaĵoj kaj malhelpoj de komunaj kursoj tute malaperas, se oni instruas distance. Oni ne bezonas ĉambregojn, ĉiu restas en sia hejmo kaj ne estas devigata marŝadi ien nepre

en fiksita tempo, neniu estas ĝenata pro sia nesufiĉa kapableco aŭ pro rango aŭ aĝo; ĉiu hejme lernas kiam li povas kaj kion li volas; ĉiuj konsiloj kaj klarigoj de instruisto celas nur lin, solan lernanton, ĉiujn dubojn de lernanto, ĉiujn faritajn de li erarojn oni klarigas al li kaj korektas speciale por li. Por instrui distance oni ne bezonas ies permeson. Du — tri anoncoj pri tia instruado en naciaj gazetoj penetros en ĉiujn malproksimajn kaj plej malgrandajn urbetojn kaj vilaĝojn kaj altiros al nia lingvo multenombrajn aspirantojn. La laboro de instruantoj distance ankaŭ estos multe pli facila kaj malpli ĝenanta, se estos eldonitaj taŭgaj por tia metodo laŭgrade numeritaj lecionoj.

En tiuj-ĉi lecionoj ĉiu aparta elemento de gramatiko kaj sintakso devas esti signita per ciferoj. Notinte la korektitan eraron de lernanto per tia cifero, la instruado tiamaniere evitos longajn klarigojn, kiujn la lernanto mem trovos en la paragrafo sub tiu cifero. Ĉiu leciono devas havi multajn ekzercojn por traduko kaj vortfarado. Kiel vortaroj por la lernantoj bone servos la Ĉefeĉ'aj ŝlosiloj.

Por Rusoj mi kune kun kompetenta samideano-instruisto nun komencis prepari la necesajn lecionojn, kiuj espereble estos pretaj kaj eldonitaj post kelkaj monatoj.

Mi tre dankus la samideanojn rusajn katalilandajn, kiuj bonvolus esprimi ilian opinion en niaj gazetoj pri mia propono instrui nian lingvon distance. *D-ro I. Ostrowski.*

Opinie wybitnych francuzów o Esperancie.

Leon Frapié pisze do p. Archdeacon'a, propagatora Esperanta we Francji: „Esperanto ma rację bytu nietylko dlatego, iż ułatwia stosunki handlowe i turystykę, ale że żywotność jego nie ulega wątpliwości, ponieważ on ułatwia dostęp do krainy inteligencji, otwiera bramy wiedzy i przyspiesza urzeczywistnienie idei braterstwa, dotąd uważane za marzenie niedościgłe.

Może pan być dumnym ze swego apostołstwa; nasze dzieci będą kiedyś wdzięczne za podeptanie sarkazmu ludzkiego i stawienie czoła głupocie

ludzkiej w tej trudnej propagandzie“.

Lucjan Guitry: „Esperanto jest wielkiem dziełem genialnego człowieka. I ja zacznę naukę tego języka, gdy tylko skończę z francuskim, z którym nie mogę sobie dać rady.“

General de la Croix: „Jest to apostołstwo, które suggestjonuje; obiecuję sobie poznać je dokładnie“.

Wiktor Margueritte: „Nasi podróżnicy powinni przede wszystkim nauczyć się Esperanta; znajomość tego języka zdobywa rynki handlowe całego świata“.

(Ciąg dalszy nastąpi.)

„Mazepa“ kaj „Halka“.

Malfacilan taskon prenis sur sin niaj krakovaj samideanoj per la decido prezenti dum VIII-a Esperanta Kongreso en Krakovo la suprenomitajn du ĉefverkojn de nia drama poezio kaj muziko.

Kvankam la teatra gusto de l' internacia publiko, kunveninta el landoj, kie teatra kulturo staras sur tre alta grado, estas tre postulema — tamen ni eĉ por unu momento ne dubas, ke la pola scenejo en Krakovo povas kontentigi la kongresanojn.

La tuta malfacilo kuŝas en tio, ke oni devas varbi por nia ideo du teatrojn: dramon kaj operan. Kaj ne nur varbi. Oni devas certigi al la teatroj sufiĉan mon sukceson de la afero kaj lernigi la aktorojn.

Malgraŭ tio ni scias, ke energio ĉion venkas, kion pruvis al ni la aranĝintoj de la antaŭaj Kongresoj. Ni kredas, ke s-ron Solski, gloran artiston kaj direktoron de krakova teatro, — tentos la okazo montri al la internacia publiko, al la „tuta mondo“ la ĉefverkon de nia Słowacki — „Mazepon“ kaj samtempe prezenti sian majstran interpreton. La scenigo de „Mazepa“ antaŭ la tutmonda publiko sendube estos ago patriota.

La samon ni povas diri pri s-ro Heller, direktoro de la Lvova Opero, kiu kantas dum somero en Kraków. Ĉu ne estas alloge diskonigi la ĉarmajn melodiojn de „Halko“ inter la „popoloj“?

La belega muziko de „Halka“ restos por ĉiam en la koroj kaj memoroj de la kongresaj gastoj. Ni kredas, ke la belaj arioj sonos poste en ĉiuj landoj.

La malfacila komenco estas jam farita: „Mazepo“ — tragedio de Słowacki

kaj „Halka“ opero de Moniuszko — estas jam tradukitaj! Facile estas diveni de kiu... Nature, ke de nia „poezia majstro“, s-ro Antoni Grabowski, kies tiakaŭzan meriton oni ne povas tro laŭdi.

Vere laŭdindan kaj trafan, „trafegan“ elekton faris niaj Krakovaj samideanoj. Oni ne povus elekti pli bone. „Mazepa“ estas grandioza, potenca, kor-skuanta, sanga tragedio de nia plej granda poeto Juljusz Słowacki, kion ni aludas nur al alinaciaj legantoj, ĉar en ĉiuj polaj koroj, en animoj, kiuj scias flugi en pli alta, pli pura sfero, sfero de poezio — eterne vivos adoro por Słowacki.

„Halka“ estas ĉarma, melodiplena opero de Moniuszko, kiu apud Chopin estas nia plej adorata, nacia muzikverkisto. „Halka“ post preskaŭ 1000-foja prezento sur polaj scenejoj, restos ĉiam same senfine vivanta per melodio, neforgesebla kaj alloga. La internacia publiko havis jam la okazon legi kelkajn ariojn el „Halka“ en „Pola Esperantisto“ („Bruas pinoj sur deklivo“, „Kiel rompita vente arbeto“, „Supren flugi volus mi kun alaŭdeto“) tradukitaj de s-ro Grabowski, kiu nun, laŭ deziro de la Krakovanoj, finis la tradukon de la tekstlibro, de eminenta pola poeto Włodzimierz Wolski.

Ke ambaŭ tradukoj estas faritaj majstre, pri tio ni eĉ ne bezonas paroli. La nomo de l' tradukinto sufiĉas. Ambaŭ libroj estos baldaŭ presataj.

Jam nun, dank' al la afableco de s-ro Grabowski, ni povas regali niajn legantojn per fragmentoj el „Mazepa“ kaj „Halka“...

M. Czerwiński.

Sentencoj el „Mazepa“.

*Havu fajran animon, vizaĝon glacian
Kaj en tombon forportu korsekretan
vian!*

* * *

Plej terura mizero esti forgesita.

* * *

*Tempo ĉion absolvas. Feliĉecon trovas,
Kiu mordantan koron supervivi povas.*

* * *

„Mazepa“

Fina fragmento el la tragedio de Juljusz Słowacki.

Akt V. — Scena VIII.

(Mazepa wychodzi. Słysząc, że go w korytarzu napadają ludzie zbrojni. — Szczęk krótkiej walki.)

WOJEWODA *(sam)*.

Biorą go, wiążą... To mi to zemsta nad wrogiem!
Sznury się w mięso wpiły... koń ciało roztarga.
Zimno mi — Synu! ojciec waszmości się szarga
We krwi, a ty się krwawej nie przeleknij mary..
Co to jest? jak tu ciemno! Jakie to poczwary
Całujące się głośno w ciemnym korytarzu?
A wstańże z trumny, wstańże ohydny nędzarzu!
Powiedz, że to nieprawda!.. każ się deskom
spaczyć!

Wstań, otwórz ty się trumno! ja gotów prze-
baczyć,

Jak mi do nóg upadniesz... Łzy gotowe pociec...
O trumno! ja ci gotów przebaczyć — ja, ociec,
Jeżeli z ciebie wyjdą łzy nad moją nędzą. —
Precz trupy! Niech szatani was przez ognie
Dosyć oszukiwania i dosyć żywota! (pędzą!)

Scena IX.

Wojewoda, Chmara, później Król na czele zbrojnych.

CHMARA.

Król...

WOJEWODA.

Daj mi kindżał.

CHMARA.

Panie, ukorz się...

WOJEWODA.

Do błota?...

KRÓL *(wchodząc)*.

Wojewodo dasz głowę...

WOJEWODA *(przebija się)*.

Ot masz... niech ją zwleką,
Lecz każ mnie od tych trupów pogrzebać da-
leko...

(pada martwy)

Akto V. — Sceno VIII.

*(Mazepa eliras. Oni aŭdas, ke en la kori-
doro atakas lin homoj armitaj. Tintado de
mallonga batalo.)*

VOJEVODO *(sola)*.

Ili kaptas lin — ligas. Jen la venĝo mia!
Ŝnur' karnon tranĉas — korpon ĉevalo ŝiradas
Malvarme al mi — — Filo! via patro vadas
En sango, — ne timigu vin sanga fantomo...
Kia mallumo? — Kiaj monstroj en la domo
Sin laŭte kisas en la mallum' koridora?
Nu, leviĝu el ĉerko, mizer' senhonora!
Diru, ke li mensogis — tabulojn disjetu!
Malfermiĝu, vi, ĉerko! — Pri pardono petu!
Antaŭ mi falu! — Eble larmiĝos pupilo —
Ĉerko! eble pardonos mi — la patr' — al filo,
Se el vi fluos larmoj pro mia mizero.
For! kadavrojn satanoj pelu tra l' infero!
Sufiĉe da trompado kaj vivo-dorloto!

Sceno IX.

*Vojevodo, Hmara, poste la Reĝo fronte de
armitoj.*

HMARA.

Reĝo...

VOJEVODO.

Ponardon!

HMARA.

Estro! subiĝu —

VOJEVODO.

Al koto?

REĜO *(eniras)*.

Vojevodo! vi donos kapon —

VOJEVODO *(mortigas sin)*.

Jen — sentime!

Sed min de ĉi-kadavroj metu mal-pro-ksi-me...

(falas senviva)

3. VI. 1911.

Trad. Antoni Grabowski.

El opero „Halqa“.

Vortoj de W. Wolski.

Muziko de S. Moniuszko.

Akto I. Sceno VI.

(*Stolnik, reĝa tablestro, tenas Zonjon sub la brako. Lia konfidato Dziemba kun arĝenta kruĉo kaj unu el la gastoj, kiu tenas en mano grandegan pokalon el tempoj de reĝo Zygmunt.*)

ĤORO (*riverencante al Stolnik*).

Ho tablestr'! kompatu do!
Vi ripozu ne permesas,
Manĝi, trinki ni ne ĉesas,
Ni festenas tro!

UNU EL GASTOJ (*malpleniginte la pokal-egon, transdonas ĝin al Dziemba*).

De l' ŝatinda mastro sanon!

ĤORO.

Ho, tablestr', kompatu do! k. t. p.

DUA EL GASTOJ (*al kiu trinkis la antaŭ-iranta*).

De l' ŝatinda parencaro!

STOLNIK (*kortuŝite, lasas la manon de Zonjo, riverencante al ĉiuj kore per ĉapo*).

Karaj moŝtoj, sinjoraro!
Konfuzite, mi ne scias,
Kiel danki plej korsente,
Tiomflanke ĉi-momente
Sur min fluas althonoro.

(*kun larmoj*)

Jen kunsentas vi en koro,
Ke la solposteulino,
Mia Zonjo, solfilino,

En la vidva mia stato
Baldaŭ patron jam forlasos,
Por kuniĝi kun amato.

JANUSZ kaj ZOFIA (*kliniĝante al liaj piedoj*).

Patro kara!

STOLNIK (*levas ilin*).

Ho filino, kar-infanoj!
(*al gastoj, pli gaje*)
Do sinjoroj, vi permesu,
Gajamuzi vin ne ĉesu!

ĤORO.

Vivu! vivu!!

STOLNIK (*vigle*).

Junularo! nun po paro,
Vi ekdancu fajranime!
Salte, kure, hop! mazure!
Kalkanfrapu pol-kutime!

DZIEMBA (*mallaŭte al Stolnik*).

Jen propono! — En salono
Oni dancas fajre, vive!
Provu ni laŭ sama tono!

STOLNIK.

Kara Dziembo! efektive!
Mi konsilon laŭdas vian!

DZIEMBA (*en salonpordo*).

Muzik'! — Dancon mazovian!

(*Oni aŭdas el salono muzikon, kiu ludas la „mazuron“; enkuras dancantaj paroj.*)

Esper. Antoni Grabowski.

Esperantistaj sentencoj.

Se vi skribas malbone en via propra lingvo, havu la bonecon skribi nur en ĝi, ĉar en Esperanto oni skribas sufiĉe malbone sen via helpo.

Nur talento, komprenado, imago, fantazio, klereco kaj bongusto — kaj vi ĉion tre bone esprimos en Esperanto. Oni bezonas nenion pli...

Internacieco ne estas neigo de nacieco: internacieco ne pretendas forigi la malbonajn ecojn de l' nacioj; ĝi volas nur transdoni la bonajn ecojn de unu nacio al la aliaj.

Kunigu la animetojn de la naciaj lingvoj — vi havos la animon de l' lingvo internacia.
(*El „Gazeto Hispana“.*) Ŝ.

KAZ. PRZERWA-TETMAJER.

Ankor' parolu...

*Ankor' parolu... Pri parolo tia
Mi longe revis... Per la son' magia
La sopirantan koron vi konsolu,
Ankor' parolu!..*

Laŭ muziko de Rutkowski.

*Ankor' parolu... Jen ni for de homoj,
Per viaj vortoj kiel per aromoj
Min ebriigu, songe luli volu...
Ankor' parolu!..*

Trad. M. Czerwiński.

La Fabelo.

De M. Krogulec (Antoni Orłowski).

Foje en granda urbo disvastiĝis famo, ke „Honto“ forlasis la urbon. Ĉi-tio kaŭzis senekzemplan sensacion. Oni ĉesigis ĉiujn okupojn, ĉiujn negocojn. Ĉiuj amasiĝadis, interpuŝadis sin, kriegis. En bruado de dekoj da miloj da voĉoj oni povis kompreni nur apartajn vortojn:

- Ĝi jam ne estas en la urbo!
- Sed kien ĝi foriris?
- Ĉu ĝi revenos?

Jen estis la demandoj, kiuj neniun lasis trankvila. Oni decidis atendi. Post du horoj ĝi ne aperis ankoraŭ. Malagorde streĉitaj nervoj komencis trankviliĝi; oni iom rekonsciiĝis, tamen ĝis la kvara horo oni sentis maltrankvilecon kaj ĉiumomente time elkuradis sur la stratojn. Je la kvina horo ĉiuj estis tute trankvilaj. Je la sesa — oni vizitadis sin reciproke por gratuli. La ĝojo estis grandega!

Sur la stratoj regis eksterordinara movado. Sinjorinoj saltadis kaj ĵetadis sin sur kolojn de preterirantaj viroj. — la sinjorino, starante sur trotuaro, spegulis sin en fenestro de magazeno kaj nigrigis siajn brovojn. Edzoj demetadis ĉapelojn kaj manglatumis siajn „kornojn“, prezentante ilin publike. Solidaj majstroj paŝadis ŝanceliĝante kaj atakadis virinojn. Modestaj knabinoj kantadis: „Rigardu tien kaj tien-ĉi!...“ Meze de unu strato du kreditoroj, kaptinte sian ŝuldanton, senvestigis lin ĝis... la nudeco. Senĉese oni aŭdis kriojn:

„Helpon!..“ „Ŝtelisto!..“ „Kaptu lin!..“ Kasistoj elkuradis sur placojn kaj per aeroplanoj forflugadis eksterlanden. Advokatoj kaptadis preterpasantojn je baskoj kaj proponis siajn servojn. Unu politikisto kuris tra la stratoj kaj fariĝadis jen blanka, jen nigra... Apud stratanguloj staris elegantaj junuloj kaj etendis manojn por almozo. En magazenoj de konfekcioj por sinjorinoj oni vendadis nur... figajn foliojn kaj korsaĵojn. Magazenaj komizinoj invitadis preterirantojn por ĉampanvino... En ĉiu domo estis kabareto, ĉiuj „demandoj“ estis forlasitaj...

Subite en le urba enirejo aperis io nigra. Momente ĉio eksilentis, ĉiuj haltigis spiradon. Io nigra proksimiĝadis — ĝi estis „Honto“! Ĝi alpaŝadis malrapide kun okuloj fiksitaj sur la teron. La konfuzita publiko ĵetis sin en dompordegojn. „Honto“ trairis ĉefajn stratojn kaj daŭrigis la vojon. Ekregis silento; ĉiuj ankoraŭ tremis, sed la espero vivigis korojn. Post unu horo da atendo oni eksciis, ke „ĝi“ atingis urban elirejon. Jen estis kriza momento! Eble „ĝi“ revenos! Multaj virinoj svenis, viroj forŝiradis siajn harojn. „Ĝi“ haltis kaj pensis momenton. Fine „ĝi“ svingis la manon kaj iris for. Eksonis unu tondra ekkrio de ravo.

Post unu horo „ĝi“ estis jam je interspaco de cent mejloj. Sed „ĝi“ kelkfoje post tio vizitis la urbon kaj promesis viziti ĝin en estonteco... Trad. J. Ch

BRONISŁAWA OSTROWSKA.

Ho, malfermu!

*Tra ĉielo vasta, hela
La nebulojn pelas vento.
Amaj songoj kaj korsento
Kun vent' flugas al vi, bela!*

*Kiel svarmo papilia,
Ludetanta kun la ventoj,
Tra la montoj, tra torentoj
Ili venas al dom' via...*

*Ho malfermu, Janko ĉarma,
Pordon de la domo via!
Miaj songoj en ar' svarma —
Ĉirkaŭflugas vin — ho, mia!*

(Muziko de St. Niewiadomski.)

*Ili lumas en sun' ora
Kiel larmoj aŭ ros' brila,
Kaj alportas svarm' kolora
Amon al la dom' trankvila...*

*Ho! malfermu, Janko, pardon
Kaj enlasu songojn miajn,
Songojn orajn, emociajn,
Inspiratajn, am-agordon.*

*Kun la gastoj suno iras
Kaj printempo la radia...
Ardan vivon, ĝuon spiras,
Do — malfermu, Janko mia!*

Trad. Juliusz Kriss, Kraków.

Kto jest Esperantystą?

W „Kurjerze Polskim“ z dnia 25-go czerwca czytamy:

Kongres esperancki międzynarodowy w Bologne-sur-Mer uchwalil następującą deklarację:

„Ponieważ przeciętny człowiek nie zna treści, nie rozumie ważności i użyteczności języka międzynarodowego, z tego powodu my tu zebrani w liczbie z górą 3,000 osób ze wszystkich krajów świata całego, reprezentanci języka Esperanto na wszechświatowym Kongresie w Bologne-sur-Mer, uważamy za konieczne w myśl autora tego języka wyjaśnić co następuje:

Ponieważ język międzynarodowy stał się konieczną potrzebą dla użytku wszystkich narodów świata całego, ważnym jest wyjaśnienie, że: język ten nie ma na celu wyrugowania języków narodowych, gdyż sam rozum dyktuje, że byłoby to niemożliwym. Język neutralny, nie mający ojczyzny, może służyć instytucjom wszystkich narodów, walczących dotąd między sobą o supremację języka.

W języku międzynarodowym mogą być drukowane wszystkie dzieła, mające wspólny interes dla wszystkich narodów.

Wszystkie wywody, jakie się wiążą z ideą języka międzynarodowego przez spóźnionych współzawodników lub z innych powodów występujących przeciwko językowi esperanckiemu, lub w końcu chcących go milczeniem zdusić, wszystkie te wywody są fałszywe, źle zrozumiane i bezcelowe, gdyż język nasz żyje już w milionach.

Dziś już nikt w świecie nie ma wątpliwości, że językiem ogólnie komunikującym może być tylko język sztuczny i że z licznych prób, w ciągłą ostatnich lat dwustu, wszystkie były tylko teorjami, projektami, ostni zaś, już w świecie dobrze przyjęty język esperancki, jest rzeczywiście zdolny do życia, zupełnie wykończony, wszechstronnie wypróbowany, okazał się użytecznym do wszystkich celów.

Z tego powodu zwolennicy idei języka międzynarodowego uznali, że teoretyczne rozprawy nie doprowadziłyby do żadnego celu i że cel ten może być tylko osiągnięty zgrupowaniem się wszystkich w praktycznej pracy około jednego wykończonego języka Esperanto. Członkowie kongresu postanowili

pracować tylko w celu z bogacenia literatury w tym języku i nie szczędzić starań rozpowszechnienia takowej, każdy w swoim kraju.

Autor języka Esperanto zaraz na początku wypuszczenia go w świat zrzekł się się raz na zawsze wobec wszystkich i po wsze czasy — prawa, korzyści i przywilejów do tego języka, a zatem język Esperanto nie jest niczyją własnością i nikt nie może rościć pretensji ani do zysków moralnych, ani materialnych, stąd wypływających. Materialnym właścicielem jego jest świat cały, a zatem każdy, kto go posiada, ma prawo pisać i wydawać wszelkiego rodzaju dzieła, używać go do wszystkich celów.

Język Esperanto nie posiada też specjalnego wydawcy. Każdemu wolno wydawać wszystko, gdzie się komu podoba. Podstawą do niewykraczania do-

wolnie przeciwko gramatyce i stylowi języka Esperanto jest książka „Fundamento de Esperanto“, w której nikt nie ma prawa czynić jakichkolwiek zmian i poprawek. Jeżeli ktoś odstąpi od podanych tam form i prawideł, nie może się usprawiedliwić, że tak życzył sobie, albo radził autor Esperanta. Dla ujednostajnienia i uprzystępnienia tego języka całemu światu, nie wolno czynić żadnych zmian, w przeciwnym bowiem razie wytworzyłyby się różnice nieprzewyżnione.

Esperantystą nazywa się każda osoba, która ten język używa do jakichkolwiek celów. Należenie do kół lub towarzystw, uprawiających kult tego języka, jest pożądanem ze względu wprawy w mowie, ale nie jest koniecznem.

Deklarację tę podpisali wszyscy członkowie Kongresu.

Propono de Dr. Zamenhof pri la organizo de niaj kongresoj.

Aldono al la Regularo de la Universalaj Kongresoj de Esperanto.

1. Ĉiu decido de Internacia Esperantista Kongreso estas deviga nur por la komunaj esperantistaj Institucioj *oficialaj*, tio estas por tiuj, kiuj estas kreitaj kaj subtenataj de la tuta Esperantistaro. Por la esperantistoj *privataj* ĝi havas valoron nur moralan, montrante al ili deziron aŭ opinion de la plimulto.

2. Partopreni en la Kongreso kaj en ĝiaj diskutoj havas la rajton ĉiu, kiu pagis la kotizon kaj submetiĝas al la Kongresa regularo; sed rajton de voĉdonado havas nur la regule elektitaj delegitoj en esperantistaj grupoj aŭ societoj.

3. Kiel delegito estas rigardata ĉiu persono, kiu prezentas al la Kongresa Komitato rajtigan leteron, kiun en la nomo de la grupo aŭ societo subskribas ĝia prezidanto kaj ne malpli ol 25 membroj.

4. Grandaj grupoj aŭ societoj povas elekti po unu delegito por ĉiuj 25 membroj, malgrandaj grupoj aŭ izolitaj esperantistoj povas por elekto de delegito kuniĝi kun aliaj grupoj. Sed neniu havas la rajton doni sian subskribon pli ol por unu elekto.

5. Ĉiu grupo povas elekti siajn delegitojn aŭ inter siaj propraj membroj, aŭ inter aliaj esperantistoj, kiuj partoprenos en la Kongreso. Ĉiu delegito havas tiom da voĉoj, kiom foje po 25 anoj havas la grupoj aŭ societoj, kiujn li reprezentas.

6. La tagordon de la Kongreso fiksas la prezidantoj de l' Konstanta Kongresa Komitato post interkonsiliĝo kun la aliaj anoj de tiu Komitato, kaj li publikigas ĝin du monatojn antaŭ la Kongreso en la *Oficiala Gazeto* por ke ĉiuj societoj kaj grupoj havu la eblon esprimi al siaj delegitoj sian opinion pri la diskutotaj demandoj.

Se ia propono ne estas akceptita en la tagordon, ĝia aŭtoro havas la rajton disdoni ĝin dum la Kongreso al la delegitoj de la Kongreso, kaj se ne malpli ol 20 delegitoj subskribas ĝin kiel diskutindan, la Kongresa Komitato devas enporti ĝin en la tagordon.

7. Ĉi-tiu projekto estas nur provizora. En la Antwerpena Kongreso la rajtigitaj delegitoj diskutos kaj voĉdonos pri ĉiu paragrafo aparte kaj faros en la projekto ĉiujn ŝanĝojn, kiuj montriĝos utilaj.

La Sepa Kongreso.

Antwerpen, la 15-an de Majo 1911.

S-roj Leutenant-Generalo Van Sprang komandanto de la militista distrikto, Grafo de Baillet-Latour, provincestro, De Vos, urbestro, General-Majoro D-ro Desguin, skabeno de la Publika Instruado, — akceptis honoran prezidantecon de la Kongreso.

La urbestro donis novan pruvon de sia intereso pri la Sepa, permesante al la gekongresanoj senpagan eniron, dum la tuta daŭro de l' Kongreso, en la muzeojn kaj en la salonojn de la urbestrarejo, kaj pruntedonante aron da belaj kliŝoj al la Sepo por ĝia kongreslibro.

* * *

Kvar novaj gefavorantoj de literaturaj konkursoj respondis la alvokon de la Sepo.

La Movado, monata Esperanto-Gazeto, 31, Boulevard St. Marcel, Paris. — *Humora rakonto, en kiu Esperanto ludas rolon.* Maksimume unu presita paĝo de „La Movado“. Du premioj: artaj objektoj.

Fino J. E. Hamand, Schaller (Iowa, Uson). — *Utilo kaj praktikaj profitoj de Esperanto por aviadistoj.* Premio: ₯ 40.

Stela-Concert, 5-a jaŭdo de ĉiu monato, Salono de l' Globo, Paris. — *Kanzono* tuj komprenebla, laŭ populara ario. Premio: arta objekto.

Germana Esperantisto, Lindenstr. 18|19, Berlin, S. W. 68. — *Priskribo de popolaj moroj*, aŭ, laŭ elekto: *Popolaj legendoj.* Proksimume 1000 vortoj en unu aŭ pluraj artikoloj. Du premioj konsistantaj el libroj por valoro de po ₯ 10.

Societo Esperantista Kaukaza. — *Originala aŭ tradukita 5—8 paĝa verketo pri iu ajn temo, kun ekskluziva uzo de radikoj, entenataj en „Universala Vortaro“ de la „Fundamento“.* 1-a premio: ₯ 12, 2-a — ₯ 8.

La lasta dato por la sendo de manuskriptoj estas la 15-a de Julio (ne la 1-a, kiel antaŭe estis anoncata).

* * *

Jen la provizora programo de postkongresa vojaĝo, kiu daŭros ses tagojn kaj kostos proksimume ₯ 40:

London, 28-an de Aŭgusto. — Vizito al Charleroi, noktloĝado en Namur.

Mardon, 29-an. — Ekskurso al grotoj de Han kaj al Dinant; noktloĝado en Liège.

Merkredon, 30-an. — Vizito al Sipa, promenado en Liège. Komuna vespermanĝo kaj koncerto en Liège.

Ĵaŭdon, 31-an. — Vizito al Ostende kaj Brügge.

Vendredon, 1-an de Sept. — Vizito al Gent.

Sabaton, la 2-an. — Vizito al Brüssel; de tie fervoje al Temsche kaj vaporŝipe al Antwerpen.

La festprogramo de la Sepo estos publikigata en la Julia n-ro de „Germana Esperantisto“.

La kongreslibro estas preskaŭ preta; ĝi estos luksa volumo, ornamita per belegaj ilustraĵoj. La kongresanoj ĝin ricevos senpage en la akceptejo; tamen tiuj, kiuj deziras ricevi la libron hejme tuj post ĝia apero, estas petataj sendi al la sekretario-kasisto de la Sepo ₯ 0,20 aŭ du respondkuponojn. La prezo de la kongreslibro por ne-kongresanoj estas ₯ 1, 0

Dum la Sepo aperos Kongreso Gazeto, kiun la kongresanoj ankaŭ ricevos senpage. Prezo por ne-kongresanoj ₯ 0,40 por kolekto de ses numeroj.

Kun granda fervoro kaj sukceso la geaktoroj kaj policianoj daŭrigas la studadon de nia kara lingvo.

* * *

Utile cum dulci.

La 2-an de l' nuna monato la Sepo kunvokis la reprezentantojn de ĉiuj Antwerpen'aj kaj de kelkaj Brüssel'aj ĵurnaloj, por doni al ili sciigojn pri la Kongreso kaj por peti helpon de la gazetistoj en sia entrepreno. Kaj por fari tiun kunvenon kiel eble plej interesa kaj agraba, la Sepo estis doninta al ĝi la formon de... festmanĝo. Ĉiuj kunmanĝantoj pasigis ĝojplenan vesperon, kaj la impresoj de l' gazetistoj — kiuj estis dekunuope — estis tiel favora, ke la morgaŭan tagon ili malkaŝe proklamis, ĉiu en sia organo, la havitan plezuron, sian intereson por la Kongreso kaj sian konfidon en ĝia sukceso.

Jan.

P. S. 4-a Junio. — Jam 888 kongresanoj aliĝis. Inter ili estas 301 britoj, 163 francoj, 154 belgoj kaj 90 germanoj.

Konsideru!

La celo en la vivo. Se vi deziras ion fari en la vivo, ion grandan aŭ malgrandan, vi ĉiam memoru, ke:

1) Vi devas havi klare difinitan *celon* — vi devas scii: kion vi intencas fari.

2) Vi devas koni *la manieron*, kiel efektiviĝi, kiel atingi la vian celon.

3) Vi devas havi la certan *impulson*, kiu vin antaŭenpuŝus aŭ tirus al ĉi-tiu celo.

4) Vi devas havi *la fidon*, ke — se vi uzos prudente la necesajn rimedojn, vi tiam atingos la celon.

5) Vi devas havi *la decidon*, ke la certan faron vi senkondiĉe plenumos.

6) Vi devas *penadi, labori*, konstante *proksimiĝi* al via celo, k. t. p.

La malfeliĉo de niaj tempoj (kompreneble

nur en certaj sociaj sferoj) estas tiel nomata: „la malsano de la volo“, malsano terurega, kiu faras senmovajn ekzemple la niajn inteligentajn klasojn.

Ho! mia leganto, kiu estas „malsana je la volo“, kaj kiu deziras resaniĝi..., mi donas al vi kontraŭ ĉi-tiu malforto la tre simplan sanigilon: trovu nur ian celon en sia vivo; ellernu *la manierojn*, kiuj kondukas al ĝi; *decidu*, ke tion aŭ tion vi faros nepre; *ekkredu*, ke al vi tio sukcesos kaj fine komencu fari *la penadojn*, komencu *labori* en ĉi-tiu direkto kaj tiam vi sendube atingos la *celon*, vi plenumos *la faron* kaj vi jam ne „malsanos je la volo“.

Rigardu, kiel simplaj medikamentoj ekzistas por via malsano!

El *Bolesław Prus* tradukis *abb.*

Homaj Idealoj.

(Fino.)

Libereco de ĉiuj homoj kaj popoloj. Homo estas provizita per saĝeco kaj per libera volo, kio diferencigas lin de ĉiuj surteraj estaĵoj, kaj precipe libereco de volo estas por ĉiu homo tre grava propreco, bazo de lia indeco, moraleco kaj justeco, ĉar pri estaĵo, kiu ne havas sian propran liberan volon, oni ne povas diri, ke ĝi estas morala aŭ justa aŭ inda. Do liberan volon, liberecon devas havi ĉiu homo por esti inda, justa kaj morala, do libereco devas esti kaj estas idealo de homo. Bedaŭrinde jam dum prantikvaj tempoj pounuaj homoj aŭ popoloj forrabis liberecon de aliaj, faradis siajn proksimulojn, tre ofte eĉ pli indajn ol ili, je malbeno kaj honto de l' tuta homaro, siaj sklavoj. Tiaj sklavoj tute jam ne havis sian volon, eĉ pli malmulte ol ia ajn dombesto, ĉar tiu lasta kiel malsaĝa estaĵo ne estadis punata pro malobeo, nur devigata kaj dresata al obeo, kaj sklavoj estadis punata senkonscie ne nur ofte pro nevola malobeo al sia reganto, sed ankaŭ pro senkulpa eraro aŭ malkompreno. Sed ne nur dum militoj ekkaptitaj aŭ en foiroj aĉetitaj sklavoj estis tiamaniere agitaj; ankaŭ ĉiuj virinoj, ĉu edzinoj, ĉu filinoj, ĉu eĉ patrinoj ne havis dum antikveco sian propran volon, ĉar viro forrabis ĝin de ili kaj kondu-

adis kun virino tute same, kiel kun sklavo. Limigado de libera volo de virino ekzistas ankaŭ nune, malgraŭ civilizacio, kaj eĉ ne nur ĉe mahometanoj; tion pruvas geedzaj kutimoj, kiuj ekzemple permesas al malmoralaj viroj diversajn ekscesojn senpune, kaj similajn ekscesojn ĉe virino hontigas kaj tre severe punas..., kiuj ekzemple permesas al malmoralaj viroj puni siajn edzinojn por eĉ malgranda eksceso — sed ankaŭ, kiel ni konvinkiĝas nune dum XX jarcento en civilizitaj landoj, oni eĉ ne permesas al virinoj porti vestojn similajn al viraj vestoj. Tio ĉio estas malinda de l' homaro, ĉiu homo, klera aŭ ne, viro aŭ virino, devas havi sian liberan volon, limigitan nur de leĝoj justaj kaj moralaj, sed ĉiam egalaj por viroj kaj virinoj, por riĉuloj kaj malriĉuloj, por kleruloj kaj nekleruloj.

Esperanto, kiu havas taskon fari la homaron egalrajta, morala kaj justa, kaj havas por tio necesajn ecojn, antaŭprezentitajn en supra ĉapitro pri egalrajteco, influos ankaŭ ĉi-tian idealon homaran, efikos, ke ĝis nun ekzistanta vendado de sklavoj tute malaperos, ke malaperos hontinda eĉ en civilizitaj regnoj malgraŭ minacantaj leĝoj ekzistanta vendado de knabinoj al friponaj entreprenoj, malaperos kutimo, moroj kaj leĝoj, permesantaj forrab-

adi de homoj ilian propran liberan volon en interlimoj de moraleco kaj justeco.

Frateco de ĉiuj homoj. Kiel ni vidas jam nune inter diversnaciaj homoj, kiel ni rimarkas kaj eksentas tion dum ĉiujaraj esperantaj ĝeneralaj kongresoj — Esperanto amikiĝas kaj fratigas ĉiujn esperantistojn; oni forgesos, konvinkojn religiajn kaj politikajn, naciajn ŝovinismojn, kaj fariĝos sub influo de Esperanto fratoj kaj favoraj amikoj. Kaj kiam Esperanto disvastiĝos sur tuta ter-

globo, kiam ĝi estos kunhelpinta al efektiviĝo de egalrajteco kaj libereco, iam ĉiuj homoj fariĝos fratoj favoraj kaj kunhelpantaj unu la alian — tiam efektiviĝos homaj idealoj: egalrajteco, libereco kaj frateco inter ĉiuj homoj, kiel tio decas por homaro, devenanta de tiu sama origino, de tiuj samaj pra-gepatroj, prahomaro, kiu vere estas gefrataro, kaj nur de diverseco de lingvoj, de maljusteco, de mal-moralece estas dividita.

Hieronim de Wierchowski.

La interesaj ciferoj.

Teruraj ciferoj. La gazeto „Union Cooperative“ citas sekvantajn ciferojn, kunmetitajn de prof. Richard, prezidanto de antialkoholisma ligo. Li kalkulis, ke alkoholismo en ĝenerala budĝeto de Francujo prezentas sin jene:

Perditaj laborpagoj (kalkulante tage po 2 frankoj) 1 miliardo 350 milionoj; eltrinkita alkoholo — 128 milionoj; kurakostoj de alkoholuloj kaj cerbe malsanaj pro drinkado — 79½ milionoj; procesaj kostoj pro diversaj kulpiĝoj — 2 milionoj da frankoj. Ensume — 1 miliardo 558 milionoj kaj 500 miloj da frankoj.

„Vivo Kooperativa“ eldonata en Wilno, citas, ke en Rusujo en jaroj 1905—1907 oni drinkis brandon je sumo 2 miliardoj 457 milionoj da rubloj.

Prof. Sikorski konstatas, ke pro drinkado mortas pli multe da homoj, ol pro mortigoj kaj memmortigoj.

En Francujo mortas 12 alkoholuloj je 1 miliono da homoj kaj en Rusujo — 53!

Inter homoj malsanaj je ftizo — 60% estas alkoholuloj kaj inter malsanaj je cerbo — 65%. Mortemo inter alkoholuloj estas 5-foje ofta, ol inter homoj, vivantaj modere

Oni povas diri, ke en kaliko dronis pli multe da homoj, ol en maro.

Kie oni plej multe vojaĝas? Sendube en Anglujo, ĉar tie en 1909 jaro nombro da venditaj biletoj estis 2,885 milionoj. Do — ĉar la loĝantaro de Anglujo la-

statempe egalas 40 milionojn, — ĉiu anglo enmeze vojaĝas 58 fojojn jare. Anglujon sekvas Belgujo (49 vojaĝoj por ĉiu), Germanujo (33), Hollandujo, Francujo, Italujo (28) kaj Rusujo (16).

Poŝto kaj telegrafo. Plej disvastigitaj estas ĉi-tiuj institucioj en Anglujo: tie ĉiu loĝanto enmeze ricevas 81 poŝtaŭ telegraf-sendaĵojn jare kaj ensume nombro da sendaĵoj estas 3½ milionoj. Poste sekvas Germanujo, dissendante jare ankaŭ 3½ milionojn da sendaĵoj do ĉiu loĝanto ricevas 55 da ili. En Francujo poŝtoŝticejoj dissendas 1½ milionojn da sendaĵoj kaj ĉiu Francano ricevas 79 da ili. En Rusujo estas dissendataj nur 686 milojn da sendaĵoj kaj ĉiu loĝanto ricevas nur 5 da ili.

Statistiko de mondanoj. Laŭ la plej lastaj registroj, sur la terglobo vivas nun 1,506 milionoj da loĝantoj. Plej multe da loĝantoj, ĉar 819½ milionojn, havas Azio; en Eŭropo loĝas 392,254,000 homoj; en Afriko — 140,700,000; en Ameriko — 123,458,009; en Aŭstralio — 6½ milionojn; la nombro de virinoj iom superas la nombron de viroj. De hipoteza komenco de l' mondo vivis ĝis nun sur la tero 400 miliardoj da homoj.

Nombro de kreskaĵoj, vivantaj sur la terglobo, atingas 120 milojn da specoj; kaj bestoj — 300 milojn da specoj, el kiuj ĉiu prezentas milionojn da individuoj; ne estas do mirinde, ke bestoj estas nekompareble pli multnombraj ol homoj.

Fakty.

Rozpowszechnienie literatury francuzkiej przez Esperanto. Dotąd tłómaczono na Esperanto wiele dzieł literackich różnych krajów. Według czasopisma niemieckiego „Germana Esperantisto“ tak się przedstawia lista krajów odnośnie do dzieł tłómaczonych: pierwsze miejsce zajmuje Francja, następnie idzie Anglja, Rosja, Polska, Niemcy, Hiszpanja.

Czyż nie idzie zatem, że rozpowszechniając Esperanto, dajemy poznać nasze poglądy, zwyczaje, literaturę, nasze wpływy w świecie, a tem samem autorzy zyskują wiele przez rozpowszechnienie tego języka.

Życzenie. Na posiedzeniu kwietniowem Rada Generalna Ardennów, na przpozycję p. Ollivet, wyraziła życzenie, aby język pomocniczy Esperanto był wykładanym we wszystkich szkołach różnej kategorii.

Zaznaczyliśmy już nieraz podobne życzenia, należy tylko dążyć do tego, aby takowe zostały jaknajprędzej w czyn wprowadzone.

W armji. Pan Ernest Archedeacon, pioner postępu w całym tego słowa znaczeniu, który nie wątpiąc w powodzenie przyszłe, był gorliwym propagatorem automobilizmu i awjatyki, obecnie całą swoją energję poświęca sprawie Esperanta, rozpowszechniając go gdzie tylko może i rekrutując jak najwięcej zwolenników tego języka.

W dniu 5-go maja miał on odczyt w szkole St. Cyr dla 500 uczniów, generała i całego sztabu oficerów.

Musimy dodać, że słuchacze nie mogli się oprzeć wymowie gorliwego rzeczownika tej sprawy i opuszczali salę zupełnie przekonani i pełni sympatji dla pomocniczego języka.

Esperanto i drukarnie. Wobec stale wzrastającej klienteli esperanckiej drukarnie zaopatrują się w czcionki esperanckie, daszkowane. Poniższa tabelka daje nam przybliżone o tem pojęcie, gdyż, oczywiście trudno o liczby dokładne, bo nie wszystkie drukarnie dają znać o sobie do międzynarodowego Związku drukarzy-esperantystów.

W maju 1911 zarejestrowano:

	Poza Europą	W Europie	Razem
Drukarń	50	297	347
Odlewni czcionek	1	6	7
Linotypij	1	4	5
Drukarzy i zecerów	111	485	596

Nadmieniamy przytem, że w Warszawie następujące drukarnie posiadają czcionki esperanckie: L. Bogusławski — S-to - Krzyska 11, Biliński i Maślankiewicz — Nowogrodzka 17, M. Arct — Nowy Swiat 53, Orgelbrand — Krakowskie Przedmieście 66, Andres i S-ka — Zgoda 7, Gins — Zielna 47, Naukowa — Hoża 60, Keller — Rymarska 8. Drukarnie te, jak wiemy, nie weszły do powyższej tabelki.

Kroniko.

Francja. Paryż. Wkrótce otwierają w Paryżu biuro informacyjne dla esperantystów-obcokrajowców. Adres biura: M-r Michel Romano, 18, rue de la Harpe, Paris V-e (France).

Lyon. Na odbytych kongresie Francuskiego T-wa Propagandy Esperanta 500 delegatów z całej Francji reprezentowało 8000 członków tego ruchliwego towarzystwa.

Rosja. Petersburg. Rosyjska Liga Esperantystów ma 30 filij i liczy 626 członków.

— Minister Handlu i Przemysłu p. Timaszew polecił wydać na koszt skarbu szczegółowe sprawozdanie z kongresu esperanckiego w Waszyngtonie, dokąd był wysłany jako oficjalny przedstawiciel Ministerjum p. Postnikow.

Władykaukaz. Generał Andrejew wy-

głosił w klubie oficerów prelekcję o Esperancie.

Póttawa. Założono Towarzystwo esperanckie, do którego zapisało się 30 osób.

Stanica Sławianskaja (Kub. obw.). Dzięki niestrudzonemu propagatorowi Esperanta p. Punko — otworzono tu już 3-cie kursy języka Esperanto; uczęszcza 50 osób.

Hiszpanja. Bilbao. Rada miasta ofiarowała miejscowemu T-wu Esperantystów subsydjum — 200 franków.

Kuba. Gazeta „El Fanal“ drukuje feljetony o Esperancie.

— „Cuba Esperantisto“ oblicza, że na Kubie istnieje:

17 Towarzystw esperanckich w różnych miastach,

11 konsulatów,

9 delegatów Powszechnego Związku Esperanckiego (U. E. A.) — i że

16 gazet miejscowych zamieszcza artykuły o Esperancie.

Japonja. W organie meteorologicznego towarzystwa, wychodzącym w Tokio, wydrukowany został w języku Esperanto artykuł o trzęsieniu ziemi w Turkiestanie.

Samos. W szkołach wyspy Samos uczy się Esperanta 373 dzieci płci obojga.

Pola Kroniko.

Varsovio. 1-an de Julio okazis en la loĝejo „Uranja“ monata kunveno de la membroj de P. E. S.

Komencante la 1-an parton, D-ro Dubrowicz tre klare kaj koncize klarigis al la ĉeestantaj gastoj principojn de la esperanta gramatiko.

Poste s-ro A. Grabowski, prezidanto de la Societo, parolis pri la lingva sento en Esperanto.

Pro okazonta en Aŭgusto de n. j. VII-a Internacia Esperanta Kongreso en Antverpeno — d-ro I. Dubrowicz en tre interesa parolado rakontis al la ĉeestantaro pri Antverpeno.

Demandon pri esperanta gazetaro pro tromulteco da gazetoj, elokvante ektuŝis s-ro Greffkowicz, elvokante viglan diskutadon.

D-ro Robin interesigis aŭskultantojn, rakontante pri diversaj faktoj, servoj, de U. E. A.

S-ro M. Czerwiński deklamis esperantajn poeziojn.

Enfine s-ro Grabowski tra legis fragmenton el „Mazepa“, kiu estas tradukita por la VIII-a Kongreso.

La kunvenon honorigis per sia ĉeesto nia kara Majstro, D-ro L. L. Zamenhof.

— *La simpatia gasto.* Antaŭ nelonge ni havis tre simpatian gaston, bohemon el Mlada Vožice, s-ron Victor Arnstein, kiu veturante Rusujon, tri tagojn pasigis

en Varsovio. Kelkaj varsoviaj samideanoj akompanis s-ron Arnstein dum la tuta vespero; ni kune ĉe la amika tablo pasigis kelkajn horojn kun vera agrablo, aŭskultante la gaston, kiu rakontis pri granda sukceso de nia lingvo en Bohemujo.

Lublin. Oni skribas al ni, ke tie propagandas nian aferon samideanoj — membroj de U. E. A.: delegito — d-ro Tiĥomirov, Namiestnikovska 36; vicdelegito — Józef Nowelt, Namiestnikovska 309; membro — Władysław Grochowski, Krakowskie Przedmieście, Komercejo de Filipowicz.

La samideanoj havas bonan esperon, ke ilia nombro rapide kreskos.

Ni deziras al ili sukceson!

Kraków. La dramatisa rondeto de Krakova Societo preparas komedieton: „Pola lingvo sen profesoro“, kiu dum baldaŭ aranĝota koncertvespero estos ludata.

— Dum someraj monatoj oni aranĝos komunajn ekskursojn en ĉirkaŭaĵo de la urbo, dum kiuj oni prelegos, deklamos, kantos k. s. Unu el la plej proksimaj ekskursoj estos la ekskurso vaporŝipe al Bielany; ĉe tiu okazo la partoprenontoj vizitos urbajn akvokondukilojn, aŭdante samtempe klarigojn pri ili de s-ro prof. Bujwid.

(El „Esperanta Informilo“.)

— *Esperanta Koncert-Vespero*. 31-a de Majo okazis en la Saksa salono koncert-vespero, aranĝita de Krakovaj samideanoj. La detalojn de ĉi-tiu sukcesplena vespero ni donis en „Korespondaĵoj“.

Nowy Sącz. Oni skribas al ni, ke tie ĝermas semoj, semitaj de kelkaj niaj bravaj fervoruloj — samideanoj. Tie ekzistas jam la klubo kaj kursoj de Esperanto.

El pola gazetaro. En 22-a n-ro de semajna ilustrita gazeto „*Świat*“ ni trovas simpatian artikolon pri U. E. A.

— „*Kurjer Łódzki*“ ĉiutaga, gazeto, aperanta en Łódź, en 133-a n-ro represas el „Pola Esperantisto“ la artikolon „Zwycięstwo Esperanta“ (Venko de Esperanto).

— „*Filatelista*“, tre zorge kaj bone redaktata monata revuo, dediĉita al kolektismo kaj aperanta en Rzeszów (Galicio), enhavas en 2—3 n-ro bonegan propagandan artikolon „Esperanto kaj filatelio“ (ankaŭ kolektismo ĝenerala).

En la noto de la Redakcio ni kun granda plezuro legas, ke „*Filatelista*“ enhavas konstantan esperantan fakon.

Sciante, ke Esperanton enkondukis tien fervora samideano, kaj propagandanto de nia kara ideo s-ro Roman Kamiński, juristo el Kołomyja, ni ĉi-tie plej kore dankas lin kaj la Redakcion de „*Filatelista*“, dezirante al ambaŭ plej grandan sukceson.

— En „*Kolce*“, humoraja gazeto (Varsovio), de kelka tempo aperis fako: „*Kął esperancki po polsku*“ (Angulo esperanta pole). Sendube, ke polaj legantoj de „*Kolce*“ estis mirigitaj, legante kvazaŭ spritaĵojn, sensecaĵojn kaj eĉ simple kalumniojn kontraŭ varsoviaj esperantistoj, agantoj kaj eĉ ĝenerale kontraŭ Esperanto. Ni pli mirigos niajn legant-

ojn dirante, ke la aŭtoro de ĉi-tiuj senhontaj atakoj estis nia „samideano“, eks-ano de Varsovia Societo, ia delegito de Fervoja Asocio, s-ro Franciszek Sandecki, kiu agis kontraŭ nia ideo pro tute privataj kaŭzoj.

Al la Redakcio de „*Kolce*“ estis sendita protesto de multaj Varsoviaj samideanoj kaj pro tio la Redakcio de „*Kolce*“ en la 24-a n-ro skribas jenajn liniojn:

„Esperanta angulo pole.

Presitaj en nia eldonaĵo sub ĉi-tiu titolo diversaj „humoraĵoj“ el vivo de Varsoviaj esperantistoj, elvokis diskutojn en la rondo de anoj de ĉi-tiu lingvo. Kaŭze de tio ni mem penis esplori rilatojn en Esperantista sfero kaj ni konvinkigis, ke ĉiuj atakoj, kiajn faris la informanto, direktante ilin sub adreson de ĉefaj esperantaj agantoj, estis tute senbazaj kaj absolute ne konvenaj.

La vivo de esperantistoj en Varsovio kaj rilatoj de la Societo interesos nin plu — tamen informojn de nia ĝisnuna informanto ni ne atentos.

La Redakcio.“

Ni insiste petas ĉiujn niajn korespondantojn alsendi al ni mallongajn raportojn pri la esperanta movado en iliaj regionoj.

NB. Niaj abonantoj kaj amikoj estas tre petataj afable alsendi al ni ĉiujn gazetojn, en kiuj oni trovas artikolojn kaj notojn pri Esperanto — aŭ komuniki al ni pri tio. Nia Redakcio ne havas eblon legi ĉiujn polajn gazetojn, tial la helpo de niaj samidenanoj estas tre dezirinda.

Oni petas noti

Novan adreson de la Redakcio de „Pola Esperantisto“

str. Włodzimierska 8, Warszawa.

Korespondajoj.

Chicago, d. 22 maja 1911. Za inicjatywą p. W. Tabeńskiego, delegata na VI Kongresie Esperantystów w Waszyngtonie, odbył się dnia 26 marca r. b. wieczór instalacyjny „Koła Polskich Esperantystów“, na którym wygłoszono mowy w językach polskim i angielskim o istocie i znaczeniu języka pomocniczego Esperanto dla postępu cywilizacji tudzież produkowane były deklamacje i śpiewy w językach polskim i esperanckim. Przy zakończeniu wieczoru rozdano między uczestników deklarację, wyrażającą zamiar zostania członkiem rzeczywistym lub sympatyzującym „Koła P. E.“.

Urządzono także kursy języka Esperanto; lekcje, prowadzone przez p. Wieczorkiewicza, odbywają się one w każdą niedzielę od godz. 2—6 popołudniu. Uczęszcza około 20—30 członków.

W dniu 14 maja r. b. odbyło się ogólne miesięczne zebranie członków, poprzedzone programem muzyczno-wokalnym. Poszczególne numera programu były jak następuje:

1) Śpiew „La tagiĝo“ A. Grabowskiego — Chór Chopina.

2) Deklamacja „La kanto de l' ligo — pan P. Wieczorkiewicz.

3) Mowa ks. R. Pawlikowskiego o znaczeniu i użyteczności języka Esperanto dla stosunków międzynarodowych.

4) Deklamacja „La vojo“ — p. J. Wieczorkiewicz.

5) Śpiew — Chór Paderewskiego.

6) Humoreska po esperancku opowiedziana przez d-ra B. Šimonka, prezesa czeskiego towarzystwa „Gradata Soc“.

Po wyczerpaniu programu nastąpiły wybory zarządu „K. P. E.“. Wybrani zostali: Prezes — p. W. Tabeński; wiceprezes — p-ni K. Michotek; sekretarz — p. J. Wieczorkiewicz; kasjer — p-na S. Filipkowska; bibliotekarz — p. Wł. Tabeński.

„Pola Rondo Esperantista“
J. Wieczorkiewicz, sekretarz.

Adres biura: 960 Milwaukee Ave.

Łódź (Lodzo). Malgraŭ la libertempo — kiam ĉiuj disveturas somerloĝejoj — la vivo en nia filio ne ĉesas. La loĝejo troviĝas nun ĉe str. Piotrkowska № 145 en lernejo de f-ino H. Cholewicka, nia samideanino; tri klasoj, sa-

lono kaj simpatia kabineto, nomata „Verdejo“, ĉiutage vespere kaj dimanĉe tutan tagan estas por nia dispono. Tiamaniere la ordinaraj semajnaj kunvenoj okazas, kiel antaŭe — ĉiumerkrede, la elementa kurso — ĉiujauĉe kaj la supera, en kiu partoprenas dekelk' personoj — ĉiumerkrede. Estas intencata ankaŭ kurso por studentoj, pri kio estos faritaj specialaj anoncoj en lokaj gazetoj. Krom tio legejo estas malfermita ĉiutage de 8—9 horo vespere.

La „Familio“ kunvenas ĉiudimanĉe jen en la societejo, por trinki komunanteon, jen en kamparo, kien estas aranĝataj ekskursoj. Da tiaj ni havis jam du: unua al Łagiewniki — 8-an de Majo; dua al Okręglik — 28 de Majo. La 18-an de Jnnio ni veturis al Rąbień apud Aleksandrów.

La 9-an de Junio ni havis neatenditan gaston s-ron Eska el Kraków, kiu, veninte Lodzon nur por tri tagoj, ne preterlasis la okazon kaj vizitis nin — siajn iamajn kunulojn. Li ĉeestis ankaŭ kunvenon de l' „Familio“. Post la vespermanĝo s-ro Eska deklamis sian poezion „La blankaj rozoj“. La ĉeestantoj lin dankis per varmaj aplaŭdoj.

La kelkaj horoj kune pasigitaj restos por longe en nia memoro.

Fajfanto.

Raporto de la „Pola Esperantista Societo“ en Zawiercie. La 26-an de Majo 1911 jaro en loka progimnazio okazis jara ĝenerala kunveno de ĉi-tiea Societo.

La kunsidon malfermis eks-prezidanto s-ro Roman Kulczycki.

S-ro Grabowski tralegis jaran raporton pri agado de la estraro (komitato) en 1910 jaro, skribita de sekretario de l' Societo, s-ro M. Witkowski; la kunvenintoj unuvoĉe akceptis la jaran kaj kasan raportojn.

Poste oni alpaŝis al elekto de nova komitato, kies rezultato estas sekvanta: 1) Stanisław Jeżewski (prezidanto), 2) Maksymilian Witkowski (sekretario), 3) Bolesław Grabowski (kasisto). Kiel anstataŭantoj de l' komitatoj oni elektis s-rojn: 1) Jarosław Szponar (reelektita), Stanisław Tarkowski. Al la revizia komisio, la ĝenerala kunveno elektis unuvoĉe s-rojn: Józef Wycisk (reelektita), 2) Michał Musiał, 3) Józef Ładoń.

Ĉe la lasta punkto de la programo, nome: diversaj proponoj, disvolviĝis tre vigla debato, en kiu partoprenis multaj anoj; inter aliaj s-ro Witkowski, delegito de U. E. A., donis mallongan revuon kaj klarigis celon kaj signifon de la „Universala Esperanta Asocio“ (U. E. A.) kaj proponis enskribiĝi al tiu-ĉi Asocio.

S-ro Witkowski proponis, ĉu ne estus bone aranĝi kongreson de la Polaj delegitoj kaj gastoj el ĉiuj filioj de polaj esperantistaj Societoj, kiuj prilaborus ian rimedon, kiel oni povus klopodi pri pli forta agitacio por Esperanto; tian kunsidon oni povus aranĝi ankoraŭ en ĉi-tiu somero en ia urbo, kuŝanta en bela ĉirkaŭaĵo, ekzemple en Złoty Potok. Ĉiuj ĉeestantoj unuvoĉe akceptis ĉi-tiun proponon, kaj s-ro Musiał proponis elspezi el societa kaso ian sumon por propagando de nia ideo.

Dum la 1910-a jaro la agado „P. E. S.“ en Zawiercie, resumiĝas jene:

1) Dank' al afableco de s-ro Mejer, direktoro de loka progimnazio, oni ricevis tute senpage — ejon por vesperaj lecionoj de esperanta lingvo; lecionoj estis aranĝataj du foje en semajno kaj estis kondukataj de s-roj St. Jeżewski, Maks. Witkowski kaj B. Grabowski.

2) 29-an de Oktobro en salono de Popola Domo — s-ro Roman Vogel, sekretario de „Pola Esperantista Societo“ en Piotrków, havis prelegon pri la lingvo internacia Esperanto.

3) La komitato klopodis diversmaniere propagandi la ideon de Esperanto per diversaj anoncoj, enmetitaj en ĵurnaloj, — dissendadis en publikaj lokoj kiel: librejoj, konditorejoj, stacidomo — specialajn afiŝojn k. t. p.

La 1-an de Januaro 1911 nia Societo havis 20 membrojn.

M. Witkowski
sekretario.

St. Jeżewski
prezidanto.

Zawiercie, 15. VI. 1911.

Esperantista Koncert-Vespero.

La 31-an de Majo okazis en granda kaj luksa salono de „Saksa Hotelo“ en Kraków Esperantista Koncert-Vespero, aranĝita de ĉi-tiea energiplena „Societo Esperanto“. Celo de tiu kunveno estis vasta propagando de nia lingvo en la urbo de VIII-a Kongreso Universala. Grandioza sukceso pruvis la popularecon kaj disvastigon de nia ideo kaj lingvo inter la

Krakovanoj, dank' al senlaca laboro de ĉi-tieaj samideanoj.

La salonon plenigis ĝis la lastaj vicoj unuaranga publiko, kiu atente aŭskultis s-ron redaktoron Zielenkiewicz, parolantan pole pri signifo de Esperanto kaj ĝia utileco. La muzikan parton de l' vespero plenigis ludo de konata violonartisto s-ro J. Soja kaj juna, talentplena fortepianisto s-ro J. Rosenstock frato de nia fervora samideano kaj konata verkisto, s-ro Leono Rosenstock.

Nian belsonan lingvon aŭdigis al aŭskultantaro la kantistoj kaj teatrludantoj. Juna kaj ĉarma kantistino (samideanino) f-ino Helena Miętkówna, lernantino de konata kantisto profesoro Bursa, kantis per sia freŝa, arĝentsona voĉo du kantojn: „Ho, malfermu“ de Niewiadomski kaj „La betuloj“ de Żeleński, en traduko de s-ro J. Kriss, kaj oni ŝin tiel fortege aplaudis, ke ŝi kantis ankoraŭ superprograme ĉarman kanton de pola poeto K. Tetmajer: „Al mi parolu“, en bela traduko de s-ro S. Kruszewski. La kantan parton finis ĥoro de prof. Bursa per nia belega himno „La Espero“, direktata de la profesoro mem. Akompanis afable la fama komponisto prof. B. Wallek-Walewski.

Ĉe fino la dramatisa sekcio de „Societo Esperanto“ sub direktado de s-ro J. Mędrkiewicz ludis ĝojigan komedieton de Tristan Bernard s. t. „La patro postkuras filinon“ („Angla lingvo sen profesoro“), ridigante la publikon pro komikaj situacioj, kompreneblaj al ĉiu dank' al multaj frazoj polaj klarigantaj, enplektitaj lerte de s-ro Mędrkiewicz. El amatoroj rimarkon meritas: f-inoj Braŭn kaj Alfus kaj s-roj Kapuściński kaj Wyrwiński.

Post la Koncerto enskribiĝis al „Societo“ granda nombro de novaj anoj kaj — kiel skribas la lokaj ĵurnaloj (Nowa Reforma, Głos Narodu, Nowiny k. t. p.) — la Koncert-Vespero konvinkis la Krakovanojn pri belsoneco kaj facileco de nia kara lingvo, kaj pruvis, ke ĉi-tiea, energia „Societo Esperanto“ plensukcese preparas la fundon por VIII-a Universala Kongreso Esperantista.

Kraków. Junio.

J. Kr.

Pri I-a kunveturo de provincaj kuracistoj en Lodzo 4—5 de junio.

Ĉirkaŭ 200 kuracistoj el diversaj urboj kaj urbetoj, de nia lando alvenis Lodzon. Unuj — scivolaj vidi Polan Manĉestron, duaj —

por konvinkiĝi pri la scienca nivelo de provincaj kolegoj, triaj — por iom sciigi de kolegoj pri progreso de l' medicino, — fine aliaj por renkontiĝi kun kolegoj, kiujn vidi ili ne povis de kelkaj aŭ dekelkaj jaroj. Regis atmosfero tre simpatia kaj kora, vere kolega.

Sed serioza laboro estis tro granda; ĉe la fino ĉiuj partoprenintoj sentis sin jam lacaj kaj enuigitaj. En tiaj kondiĉoj, ĉar en la lasta momento de kunveturo, mi havis prelegon pri „valoro de Esperanto por kuracistoj“. En ĉiu okazo ĝin aŭdis dekelkaj kolegoj, aŭskultante kun granda atento sciigojn pri progreso de nia lingvo, pri ĝia facilego, beleco, pri sukceso en medicino k. t. p. Por multaj ĉio tio-ĉi estis novaĵo surpriza kaj sendube instigos ilin al studado de lingvo internacia. La resumon de mia prelego oni trovos en Ĵurnalo de kunveturo, tiamaniere, kiu ne povis ĉeesti mian paroladon, iom sciigos el tiu-ĉi fonto.

De sekretario de TEKA d-ro Robin mi ricevis multajn jarlibrojn de TEKA (1910), specimenojn de „Pola Esperantisto“, „Tagiĝon“ de A. Grabowski en aparta eldono, broŝuron de St. A. Dobrzański „Esperanto u nas“, propagandajn foliojn de J. Günther. La duan tagon mi jam nenion trovis sur la tablo, kvankam restis eldonoj seriozaj specialaj medicinaj.

El samideanoj mi havis feliĉon manpremi kaj paroli kun kolegoj: Geliebter el Zamość, Skłodowski el Varŝava, Praŝkier el Zduńska Vola, Kamelhar (ankaŭ) kaj Stanisławski el Loviĉ. Bedaŭrinde neniu el ili havis verdan stelon...

Mia esperanta parolado pruvis al kolegoj, ke Esperanto estas jam lingvo viva, belsona, facila, kaj mi estas konvinkita, ke post tiu-ĉi kunveturo multaj kolegoj aliĝos al TEKA.

Lodzo, 11. VI. 1911.

Ago.

El Esperanta Mondo.

Grava alvoko. En Munĥeno ĵus fondiĝis granda internacia asocio por *Organizado de la spirita laboro* sub nomo „La Ponto“. Komence de Majo estis eldonita libro de ĉirkaŭ 200 paĝoj en germana lingvo, kiu enhavas la necesajn klarigojn kaj bazojn pri tiu organizaĵo. La libro estos tradukata en 12 kulturlingvojn, sed, ĉefa afero, tiu grava tradukado ne farigas senpere el la germana originalo, sed *per Esperanto*. Oni do, unue, tradukos la tutan libron esperanten, kaj poste oni faros la naciajn tradukaĵojn el tiu internacia kaj unueca teksto. La tuta laboro estos gvidata de l' subskribinto tiamaniere, ke li tradukigos la originalan tekston en Esperanton per plej kompetentaj esperantistoj, kiuj bone scias germanan lingvon. Ĉiu tradukonto prilaboros unu ĉapitron, kaj la tuta manuskripto estos reviziata de komisiono. Poste oni agos same en nacia kampo, pri la retraduko en naciajn lingvojn.

Celo de tiu alvoko estas nun, ke ĉiuj lertaj esperantistoj, kiuj estas pretaj traduki pli malpli grandan parton de tiu libro, ĉu el germana lingvo esperanten, ĉu el Esperanto en sian naciajn lingvon konigu sian nomon al la subskribinta gvidanto. Ĉar oni ne povas pagi la laboron, oni estas devigitaj dividi ĝin inter multaj fervoraj kaj sindonaj esperantistoj.

Se ĉiu *bona* esperantisto tradukos nur po unu aŭ du paĝoj, la laboro povas esti farita en tre mallonga tempo, kaj ni denove pruvos al la mondo, ke nia lingvo estas supera ilo por tiaj entreprenoj, kaj tio certe estos grava propagandilo por Esperanto kaj U. E. A.

Ĉiuj interesatoj kaj helpemaj samideanoj — kiuj lerte uzas nian lingvon — donu sian adreson al *J. Schmid*, L. K. federala Komerca Departamento B e r n, Svisujo.

P. S. — La nomo de ĉiu tradukinto montrigos ĉe kapo de la tradukita de li parto (ĉapitro ktp.).

Aviado kaj Esperanto. La grava franca gazeto „L'Aero“, dediĉita al aviado, presas ĉiusemajne artikolojn esperante. Ĉiuj do, por la intereso de nia afero, estas petataj kunlabori sendante mallongajn artikolojn pri flugoj, eksperimentoj, aviadaj festoj k. t. p. al la esperanta redaktoro s-ro R. di Rienzi, 45 B-d des Batignolles, Paris.

Muziko kaj Esperanto. Ĵus aperis nova ĵurnalo, *La Rénovation musicale* (12, place des Victoires, Paris), kiu celas propagandi la ciferan muzikon, laŭ la sistemo Galin-Paris-Chevé — per helpo de nia lingvo.

En ĝi ni vidas kontinuan de la projekto jam inicita de nia fervora samideano Em. Robert

kiu antaŭ tri jaroj publikigis broŝureton s. t.: *Cifera muziko per Esperanto*.

En la programo de „La Rénovation musicale“ ni interalie legas:

„Ni volus, ke la Arto ne estu privilegio de malmultaj homoj, sed ke ĝi estu la bono de ĉiuj kaj ke ĝi estu parto de edukado, starigita sur tia sama grado kiel literaturo aŭ scienco.

— — — — —
Kaj, ĉar nia sistemo traĵiros limojn de nia lando, ni akceptas, kiel instruan lingvon — internacian, simplan kaj logikan — Esperanto. Laŭ „*Le Monde Espérantiste*“.

La Antaŭkongresaj tagoj en Dresden. Drezdenaj samideanoj kore invitas esperantistojn, veturantajn kongreson en Antverpeno, viziti Dresdenon kaj vidi admirindan, grandegan, plenan da trezeroj Internacian Higienan Ekspozicion. La drezdanoj 16—18-an de Aŭgusto aranĝas antaŭkongresajn tagojn kaj proponas poste kune veturi Antverpenon.

Por sciencistoj kaj teknikistoj. En la lastaj numeroj de „*Scienca Revuo*“ (Novembro 1910 — Februaro 1911) estis publikigata grava verko, titolata: *Konsilaro por farado de la sciencaj kaj teknikaj vortoj*. Ĝi estas verkita de la Scienca kaj Teknika Komisio de la vortaroj, starigita de la Scienca Asocio, por gvidi la sciencistojn kaj teknikistojn en la elekto de vortoj, kiujn ili bezonas.

Ni atentigas niajn legantojn pri tiu raporto Ĝi estas aparte eldonita en broŝuro ricev-ebla ĉe s-ro Thalwitzer, Kotschenbroda, Dresden, Germanujo (prezo 8^m 0,75).

Internacian rondon de esperantaj poetoj proponas fondi s-ro S. Frantz, 21, rue Alain-Chartier, Parizo.

La projektanto tiel skizas la celon de la „poeta rondo“:

- 1) propagando de la esperanta literaturo inter la novaj adeptoj;
- 2) diskonigo de la verkoj de ĉiuj naciaj poetoj per esperanta traduko, por montri la taŭgecon de Esperanto por la esprimo de sentoj kaj ideoj;
- 3) eldoni gazeton por ebligi al ĉiuj esperantaj poetoj presigi siajn verkojn.

Ĉi-tiu eksterordinara projekto trovas nur unu baron: ni ne havas tiom da esperantaj poetoj, kiom da ili esperas trovi s-ro Frantz.

Multego da versaĵoj tiel malavare, ho ve, disĵetataj de diversaj „poetoj“, nur ofendas eĉ la plej malaltan komprenon de poezio.

Ili eĉ ne meritas nomon — versaĵoj! Nek ritmo, nek senco — vi trovas en ili. Veraj rekordoj de banalaĵoj kaj vulgareco!

Ni eĉ ĝojus, se ĉiuj „poetoj“ posedus propran organon: esperantaj gazetoj estus purigitaj de iliaj „poeziaĵoj“ kaj redakciaj korboj starus malplenaj.

La gazeto sendube trovas multajn abonantojn inter „poetoj“ — sed ni, ni simpluloj, povus ĝin ne legi! Kia plezuro!

Iu diris: „Antaŭ ol flugi — vi lernu iradi!“
(*La Red.*)

Amerika energio. Nia kolego „German-Aŭstria Esperantisto“ skribas:

„*La Simbolo*. Tiu-ĉi tre laŭdinda amerika beletristika revuo ekzistas nun jam de du jaroj, fondita kaj farita de nur unu tre energia viro, s-ro F. Sivers, kiu mem redaktis, kompostis kaj pretigis la gazeton en magazeno, posedante post la pago de la presliteroj en Januaro 1909, entute nur 8^m kiel eldonadan kapitalon! Dume li ankoraŭ konstruis, li sola, dometon kaj presejon sur terpeco, por kiu li ankoraŭ devas pagi, kaj kulturis kune kun sia edzino bonan ĝardenon, kiu tre helpis ebligi ekziston. Sed nun li deziras posedi presmaŝinon, ĉar li volas presi broŝurojn, libretojn k. t. p., por propagando kaj por provizi lernejojn por diversspecaj studlibroj de Esperanto.

Kiu helpos tiun imitindan, vere amerikan pioniron de nia afero, atingi lian celon, abonante lian gazeton?“

Senpage ricevas ĉiu samideano, kiu sendas internacian respondkuponon al D-ro Schramm, Dresden 20 (Germanujo), la belegan esperante presitan broŝuron pri la iuternacia Higiena Ekspozicio en Dresden. Ĝi enhavas multajn ilustraĵojn kaj bonajn artikolojn kaj estas bona propagandilo. Estas grava afero, ke aperis ne nur nacilingvaj broŝuroj pri la Ekspozicio, sed ankaŭ esperanta broŝuro. Por montri al la registaro, urbestro kaj estraro de la Ekspozicio, kiel granda jam estas la esperantistaro, oni petegas ĉiujn samideanojn sendi internacian respondkupononaŭ poŝtmarkojn je 15 sd. Tuj ili ricevos la valoran libron.

NEKROLOGIO.

6-an de Majo foriris el niaj vicoj en la alian mondon juna, 21-jara fervora samideano **Zenon Ihnatowicz** el Płock.

Falĉilo de morto subtranĉis la junan vivon; tamen la morto estis kompata kvietigo por ĉi-tiu malfeliĉa junulo, kiu de frua junaĝo estis minacita de blindeco kaj de du jaroj li suferis terurajn kap-dolorojn pro absceso en la cerbo.

Malgraŭ tia kompatinda stato de la sano, Ihnatowicz adoris nia karan idon, kiu fariĝis lia viv-idealo, lia amataĵo.

Estante tre kapabla, li rapide eklernis Esperanton kaj konis ĝin perfekte, kion pruvis la traduko de noveleto „Pro la Reĝino“, presita en „P. E.“ (№ 7—8 1909).

Vere kortuŝantaj estas linioj el la letero de lia patrino:

„Esperantan steleton mi alpinglis al la vesto de l' mortinto; esperantajn poŝtkartojn kaj delegitan karton de U. E. A. mi metis en la ĉerkon, ĉar la filo petis min pri tio antaŭ la morto; ĉi-tio estis liaj trezoroj.

La lasta deziro de mia mortinta solfilo estis havi esperantan surskribon sur la tombo...“

Al la respektinda patrino de la mortinta samideano ni esprimas nian kor-profundan bedaŭron kaj kondolencon.

Ripozu en eterna trankvilo nia juna amiko!

La Redakcio.

Diversaĵoj.

El historio de Esperanto. La unuaj esperantistoj estis plejparte rusoj kaj poloj. Tion pruvas eldonita de d-ro L. L. Zamenhof — en 1889 j. „Adresaro de la personoj, kiuj ellernis la lingvon Esperanto“ — Serio I (№ 1—1000). Jen la tabelo de la unuaj samideanoj, ordigita laŭ landoj:

Rusujo kaj Polujo	921	Svedujo	4
Germanujo 29	Turkujo	2
Aŭstrio-Hungarujo	21	Italujo	2
Anglujo 9	Sen adreso	2
Francujo 5	Ĥinujo	1
Usono 4	Rumanujo	1

(Laŭ „La Kroniko“).

La telefono en New-York. La urbo en New-York estas vera hejmo de la telefono, ĉar oni nenie tiom mĝlte telefonas, kiel en tiu-ĉi „grandega karavanejo“.

Oni ekscias la plej novaj sciigoj de la unuiĝo de New-York'aj telefon-abonantoj, ke antaŭ 30 jaroj la telefonadresaro de tiu-ĉi urbo nomis 252 personojn; hodiaŭ tiu-ĉi libro konsistas el 800 malvaste presitaj paĝoj.

Antaŭ 30 jaroj la urbo posedis nur unu telefon-oficejon; hodiaŭ jam ekzistas 85, en kiuj laboras 5,000 telefon-oficistinoj. La plej granda el tiu-ĉi telefonoficejoj posedas pli multe da abonantoj ol Grekujo kaj Bulgarujo kune. La grandega telefonreto de New-York tute ne konas ripoztempon. Oni parolas plej mal-multe per telefono inter la 3-a kaj 4-a horo matene: tiam oni postulas nur 10 kunligojn ĉiuminute. Inter la 5-a kaj 6-a metene jam 2,000 New-York'anoj uzas la telefonon. Duonhoron pli malfrue la nombro de l' kunligoj duobligas-

Inter la 7-a kaj 8-a matene jam 25,000 personoj malhelpas la matenmanĝon de 25,000 aliaj personoj.

Je la oka horo kaj 30 minutoj la nombro de ĉiuminutaj kunligoj superas 150,000. La ple granda telefon-komunikado estas inter la 11-a kaj 12-a horo antaŭtagmeze; tiam oni postulas ĉiuminute pli ol 180,000 kunligojn.

(„Esperanto“.) *G. Wirenius* (Dresden).

La ripoztago ĉe diversaj popoloj. La popoloj de l' malnova mondo alprenis, por ripozi, la sepan tagon de la semajno: — la Grekoj — lundon; la Persanoj — mardon; la Azianoj — merkredon; la Egiptianoj — ĵaŭdon, la Mahometanoj — vendredon; la Hebreoj — sabaton la Kristanoj — dimanĉon.

Reformo de l' Kalendaro. Laŭ deziresprimo de l' Internacia Kongreso de la Komercaj Ĉambroj (1910 en London), la svisa registaro (Consel fédéral suisse) intencas kunvoki diplomatan konferencon por reformo de l' Kalendaro. Ĉar la solvota demando estas sufiĉe grava, ĉiu interesulo, kiu havas bonan ideon pri tiu reformo, estas petata sendi sian proponon — se eble en Esperanto — al la svisa registaro kiel eble plej baldaŭ. Ju pli da opinioj esprimiĝos, des pli interesa fariĝos la konferenco.

La subskribinto, komisiita kolekti kaj traduki la diversajn proponojn, estus feliĉa, se alvenus kiel eble plej granda nombro da leteroj en nia bela helplingvo.

Bern, Marto 1911. *J. Schmid, L. K.*
(El „Oficiala Gazeto Esperantista“.)

Bibliografio.

La libroj ricevataj lastatempe kaj preparotaj pli detale en la venonta n-ro:

Ostlorn, vilaĝaj skizoj de *S. Ulfero*, trad. el holanda lingvo de M. J. Wessel.

Ondino de Frid. Bar de la *Motte Fougué*, trad. el germana originalo de K. Myslik; prezo ₯ 0,50.

Le Problème de la Langue Internationale de *E. Boirac*.

Konkordanco al la Krestomatio de *J. C. O'Connor*, *Ph. Dr. M. A.* kaj *C. F. Hayes*, unua parto. La Participoj, prezo ₯ 0,13.

Kelkaj vortaj pri Teosofio de *Diou-Trouillon*; prezo ₯ 0,10.

Funebra Parolado de *Bossuet*, trad. de Louis Bastien; prezo ₯ 0,40.

Esperantista Kantaro (notoj kaj vortoj) kolektitaj de *K. Jost*.

Ravenna, ilustrita gvidlibro verk. de *A. Tellini*.

10 - s p e s d e k a Biblioteko Esperantista, eldono de Esperanto-Propaganda Instituto en Leipzig:

N^o 1. *D-ro L. Zamenhof*. Kongresa Parolado en Washington.

N^o 2. *Prof. P. Christaller*. Propraj nomoj en Esperanto.

N^o 3. *Heinrich Heine*. Libro de kantoj.

Gvidlibreto tra Rouen — kun ilustraĵoj.

Internacia Higiena Ekspozicio en Dresden (ilustrita).

Muzik-notoj:

Saluto al Belgujo, vortoj de H. Menalda, muziko de F. De Ménil.

Alvoko, vortoj de G. J. Cox. muziko de Oskar T. Fernen.

Konkurso de Antido.*)

S-ro R. de Saussure anoncis gravan konkurson. Li promesis 500 frankojn al tiu, *kiu klarigos logikan sencon de vorto grando*:

laŭ Antida sistemo *grando* = kvalito „grand“,

laŭ Ida sistemo *grando* = homo granda.

Ĉar mi ne konas sistemon Antidan kaj ne sufiĉe bone — sistemon Idan, mi kun granda bedaŭro ne povas partopreni en tiu, tiel profitona konkurso. Mi scias nur, ke en Zamenhofa sistemo *grando* = *io granda*, en sencoplej ĝenerala. Mi eĉ pensas, ke:

1) ĝi *ne povas signifi* ion alian, ĉar: a) en Esperanto radikoj havas per si mem nenian gramatikan karakteron; b) ili alprenas ĝin nur per finiĝoj; c) *o* estas ĝenerala, *ne kvalifigita*, finiĝo substantiva. Sekve *grando* signifas *io granda*, t. e. tio, kion ni en lingvoj slavaj esprimas ankaŭ per finiĝo *o* aŭ per neŭtra adjektiva formo (dobro, piękno... wielkie, zle), en lingvoj romanaj kaj germanaj per ne-logika, konvencia uzo de artikolo difinita (le vrai, le beau, le bien, le mal... das Gute, das Grosse...). Se en Esperanto ni bezonas dispecigi, specialigi tiun ĝeneralan ideon, ni uzas specialajn sufiksojn: *ulo* (persono), *aĵo* (objekto), *eco* (kvalito), *ado* (ago aŭ stato)... eĉ pli specialajn, en kiujn dispecigas *ulo*: *isto*, *ano*, *estro*... Tio okazas ne nur kun radikoj, kiuj en Antida sistemo estas nomitaj *adjektivaj*, sed kun aliaj. Eĉ *homo*, *tablo*... estas ideoj ĝeneralaj kaj se ni, ekzemple, havas specialajn sufiksojn por homaj rasoj: blanka, nigra, flava..., aŭ por homoj saĝaj kaj malsaĝaj, por blonduloj kaj nigrharuloj, aŭ por diversaj specoj da tabloj: rondaj kaj kvadrataj,

lignaj kaj feraj k. c. — ni en bezono certe uzus ilin por dispecigi ideon ĝeneralan: *homo*, *tablo*... en tiujn ĉi specojn:

2) ĝi efektive signifas tion en viva lingvo Esperanto, — almenaŭ ĉe bonaj aŭtoroj. El granda amaso da ekzemploj, kiujn mi povus citi, rememorigas versaĵo, per kiu Zamenhof finis sian belan parolon dum malfermo de Buloŝa Kongreso:

„al vi, granda fonto de amo kaj vero, hodiaŭ ni preĝas!

„muroj falos por ĉiam, kaj amo kaj vero ekreĝos sur tero!“

Cetere, eĉ s-ro Couturat, severa logikisto, estis devigita konsenti, ke „belo per si mem certe ne signifas „bela viro“, ke oni ne povas diskuti pri ĝi el logika punkto, ĉar ĝi estas „nur konvencionala abreĵo“...

Mi konis du junulojn, kiuj interkonsentis anstataŭi ĉiujn vortojn per iliaj kontraŭaĵoj: tiuj ŝerculoj diris *blanka* anst. *nigra*, *tero* anst. *ĉielo*, *demono* anst. *Dio*, *fajro* anst. *akvo* k. c. Ili plene atingis celitan rezultaton: kiam ili interparolis, apudsidantaj kolegoj komprenis nenion.

Sed tio ne estas la celo de lingvo internacia.

Des pli mirinde estas, ke tion diris severa logikisto, defendanto de vera (? — Red.) ideo: ke en Lingvo Internacia ĉiuj derivaĵoj devus esti logikaj kaj konformaj al teoria sistemo, unufoje por ĉiam starigita, senescepta, taŭga por ĉiuj okazoj. Ĉiu *konvenciono*, teorie ne pravigita, prezentas escepton, kiu pli aŭ malpli detruas la sistemon. Adam Zakrzewski.

*) Kvankam ni tiun-ĉi artikolon presas, — ni ne konsentas kun ĝia bazo, kaj kun kelkaj opinioj de l' estimata aŭtoro.

Revuo de la Gazetoj.

NOTO. En ĉi tiu fako ni regule citas ricevatajn interŝanĝe gazetojn en kronologia vicordo—laŭ tempo de ilia ricevo.

(21|V) **Ardena Stelo** (Majo) Monata Revuo Esperantista de Ardenaj kaj Nord-orientaj landoj.

(21|V) **Le Monde Espérantiste** (Majo).

(21|V) **La Marto** (Majo).

(22|V) **Cuba Esperantisto** (Majo).

(22|V) **Sarta Stelo** (Majo).

(22|V) **Lingvo Internacia** (Majo).

(23|V) **Esperanto** (20 Majo).

(24|V) **Nederlanda Katoliko** (Majo).

(24|V) **Rund um die Welt** (Majo).

(24|V) **Juneco** (Aprilo). Ni trovas pol-lingvan artikolon pri Esperanto: „W jedności siła“, verkita de E. Gacki. Tre bona artikolo havus pli grandan valoron kaj signifon por tutmonda esperantistaro, se ĝi estus skribita esperante.

(26|V) **Esperanta Informilo** (20 Majo).

(26|V) **Germana Esperanto-Gazeto** (21 Majo).

(29|V) **La Ondo de Esperanto** (Majo).

(29|V) **Eŝo Esperantista** (Majo).

(29|V) **Germana Esperanto-Gazeto** (29 Majo).

(30|V) **Japana Esperantisto** (Aprilo).— Ni kore salutas nian reviviĝintan ekstrem-orientan kolegon!

(1|VI) **Amerika Esperantisto** (Majo).

(1|VI) **Antaŭen!** (Junio) Oficiala Organo de la Germana Laborista Esperanta Asocio; germane kaj esperante.

(1|VI) **Kataluna Katoliko** (Aprilo) Ĉiumonata Organo ĉe la Kataluna Ligo de Katolikaj Esperantistoj; red. k. adm.: Librejo Rosals, Barcelona, Puertaferri 30.

(2|VI) **Gazeto Hispana** (Majo).

(5|VI) **Germana Esperantisto** (Junio).

(6|VI) **The British Esperantist** (Junio).

(6|VI) **Franca Esperantisto** (Junio).

(6|VI) **Mitteilungen** (Junio).

(6|VI) **Kolombia Stelo** (Februaro).

(6|VI) **Rund um die Welt** (Junio).

(6|VI) **Internacia Socia Revuo** (Junio).

(7|VI) **Greklingva Esperantisto** (Aprilo).

(7|VI) **Oficiala Gazeto Esperantista** (25 Majo).

(7|VI) **Bulletin Officiel** (Junio).

(9|VI) **La Kroniko** (Julio) Tutmonda Revuo pri kroniko, statistiko kaj propagando de Esperanto; monate, esperante; red. Karlo Steier — eldonejo Esperanto — Propaganda Instituto, Leipzig, Kaiser Wilhelmstr. 15; jarabono 1,00; kun aldono „Biblioteko Esperantista“ (ĉiumonate 24-paĝaj kajeroj) 2,00. — Vastega kaj diversflanka programo de la gazeto aŭguras al ĝi sukceson — des pli, ke „La

Kroniko“ estas organo de serioza entrepreno „Esperanto-Propaganda Instituto“.

(9|IV) **Universo** (VIII-a kajero).

(9|VI) **La Dek-Sepa** (Julio).

(9|VI) **La Revuo** (Junio).

(11|VI) **Voĉo de Kuracistoj** (Julio).

(11|VI) **La Movado** (Junio).

(13|VI) **Esperanto** (5 Junio):

„Ni la mortintaj! Vi kelkfoje, pli ĝuste tre ofte, renkontas personojn, kiuj vin rigardas, triumfe dirante:

— Esperanto? Sed ĝi ja estas mortinta afero. Mi legis en la gazeto de V., ke la Esperantista movado malsukcesis, ke la nombro de la adeptoj de tiu lingvo rapide malgrandiĝas, ke...

Kaj aliajn vi aŭdas, kiuj klare anoncas al vi:

— Esperanto? Sed pardonu, vi ne estas bone informata. Mi ĵus legis en la ĵurnalo de S. gravegan artikolon de de profesoro O., Nobelpremiulo, mi petas, kiu asertas, ke anstataŭ Esperanto triumfas nun ĉie la lingvo Esperido, pli scienca, pli logika, pli facila...

Anstataŭ indigni kaj argumenti, montru al tiuj profetoj la liston de la Esperantistaj kunvenoj, okazontaj dum tiu somero, pli speciale dum tiu Pentekosta semajno: Kongreso germana en Lübeck, Kongreso angla en Southport, Kongreso belga en Charleroi, Bohema festo en Brno, Kongreso en Limoges, Kongreso en Le Mans, Kongreso en Genova, Esperanta kunveno en Zürich (mi certe forgesas kelkajn)... Neniam okazis tiel multe da kunvenoj, neniam Esperanto estis tiel viva, neniam nia agado estis tiel vigla kaj generala.

Ni mortintaj fartas tre bone! H. H.

Aldone estas kunsendita **Virina Bulletin**, Organo de Virina fako U. E. A.

(13|VI) **Helpa Lingvo** (Majo).

(13|VI) **Esperanta Penso** (Majo).

(15|VI) **Nova Sento** (Junio).

(15|VI) **La Spritulo** (Junio).

(15|VI) **La Holanda Pioniro** (Junio).

(16|VI) **Juna Esperantisto** (Junio).

(16|VI) **Internacia Stenografia Gazeto** (Junio).

(17|VI) **Časopis Českých Esperantistů** (Aprilo—Majo).

(18|VI) **La Ondo de Esperanto** (Junio).

(20|VI) **Le Phare Sténographique** (Junio).

(20|VI) **Danubo** (Majo).

(23|VI) **Belga Esperantisto** (Junio).

(23|VI) **Japana Esperantisto** (Majo).

(23|VI) **Monda Poŝto** (Junio).

(23|VI) **Kaukaza Esperantisto** (Majo).

(25|VI) **Le Monde Espérantiste** (Junio).

(25|III) **Lingvo Internacia** (Junio).

(26|VI) **Fervoja Esperantisto** (Junio).

(26|VI) **Greklingva Esperantisto** (Majo).

(26|VI) **Kataluna Esperantisto** (Junio). Ni legas:

„Valencia. Post la vizitado de kelkaj gravaj urboj, pola doktoro Marcin Steckiewicz, kuracisto de la Rusa Militistaro (el Kielce), honoris per sia vizito Valencion, el kie li jam de kelka tempo havis korespondantinojn.

La kvintaga restado de d-ro S. en Valencia — certe estos neforgesebla, tiel por la klera pola doktoro, kiel por la Valenciaj gesperantistoj, kiuj gardos ĉiam en la koroj la memoron pri tiu-ĉi fratiga vizito.

D-ro Steckiewicz havis tre aplaŭditan pa-

rolon en sidejo de tiea grupo pri gastemo de Barcelonaj kaj ĝenerale Katalunaj esperantistoj.“

(26|VI) **Brazila Esperantisto** (Marto—Aprilo).

(26|VI) **Belga Katoliko** (Majo) Oficiala Bulteno de Belga Katolika Ligo Esperantista.

(26|VI) **Semo** (7, 14 k. 15 Majo — 1 Junio) aperas nun ĉiusemajne kun tre interesa kaj sperte redaktata enhavo.

(26|VI) **Espero Katolika** (Aprilo—Majo).

(26|VI) **Esperanto** (20 Junio).

Priesperantaj journaloj:

Welt-Post, monata revuo, ofic. organo de Internacia Ligo; diverslingve.

Le Théosophie (Majo).

Konkursoj kaj problemoj.

La konkurso pri „je“.

Anoncita en 1—2 n-roj de „P. E.“ konkurso pri uzado de prepozicio „je“ donis al ni tute kontentigan rezultaton. Respondis: s-roj: Czesław Kozłowski el Kiew, „Je“ el Varsovio, pastro Linowiecki el Aleksandrów, B. Mirski el Łódź kaj H. Przybylski el Siberujo, alsendante multajn ekzemplojn, en kiuj uzo de „je“ estis ĝusta kaj necesa, tamen intermiksita kun ekzemploj, kie „je“ estis nek ĝusta, nek necesa.

La plej multajn ekzemplojn donis s-ro B. Mirski el Łódź, al kiu ni aljuĝas I-an premion (libroj elektitaj laŭdezire je valoro 5 rb.).

La II-an premion ni aljuĝas al la aŭtoro subskribita per pseudonimo „Je“ (libroj je valoro 3 rb. aŭ pentraĵo de Matejko „Grunwald“ — en kopio — nature).

Ĉi sube ni donas la liston de elektitaj plej bonaj ekzemploj, kiuj — laŭ nia opinio — estas ĝustaj, sed ĉu uzo de „je“ estas en ili necesa — pruvos

la dua konkurso,

kiun ni aranĝas tiamaniere:

Kiu elektos el subecititaj ekzemploj plej multe da ili anstataŭeblaj per alia prepozicio kaj ĝuste ilin anstataŭos, — ricevos kiel premion „Fundamentan Krestomation“ de nia Majstro.

Respondojn oni devas sendi antaŭ la 1-a de Septembro.

Ekzemploj de uzado de prepozicio „je“:

Mi sopiras *je* mia perdita feliĉo. — Mi okupas min *je* ĥemio. — Mi ne povas respondi *je* tio-ĉi. — Mi na estas kontenta *je* via kon-

duto. — Mi esperas *je* via subteno. — Vi veturos *je* miaj kostoj. — Mi aĉetis librojn *je* valoro de kvin spesmitoj. — Mi malsanas *je* la okuloj. — Mi suferas *je* okulmalsano. — *Je* la unua rigardo ĝi ŝajnas facila. — Via letero abundas *je* multaj eraroj. — Mi proksimiĝis al li *je* kelkaj paŝoj. — Via bieno estas riĉa *je* arbaroj. — Mi juras *je* Dio. — *Je* kioma horo? — Kredi *je* Dio. — *Je* duono pli. — Konforme *je* postuloj de l' scienco. — Edziĝi, edziniĝi *je* kiu. — Respondi al iu *je* io. — Senigi iun *je* io. — Simila, similigi *je*... — Mi povas kalkuli *je* miaj dek fingroj. — Li forkuris, kiam mi ekkriis *je* li. — Mia kredo *je* homoj. — Ili kulpigis lin *je* herezo. — Li estas kontenta *je* mi. — Plena *je* deziroj. — Plena *je* lumo. — Plena *je* gloro. — Li kaptis aglon *je* flugiloj. — Puto profunda *je* dek metroj. — Mi alvenis *je* la tria. — Moko *je* homoj. — Subaĉeti *je* krimo. — Aludi *je* io. — Kuraĝi *je* io. — Atenci *je* libero. — Aspekti *je* homo. — Asekuri *je* incendio. — Sorto estas avara *je* karesoj. — Plena *je* veneno. — Meti *je* ies kredito. — Blinda *je* okuloj. — Muta *je* bonaj vortoj. — Boji *je* iu. — Butonumi *je* ĉiuj butonoj. — *Je* ies nomo. — Mi juras *je* mia honoro. — Diferenco *je* kelke da kopekoj. — Dika *je* 2 metroj. — Diskonti *je* 5⁰/₁₀. — Mi doloras *je* koro. — Ekzamini *je* io. — Fanfaroni *je* io. — Fieri *je* io. — *Je* 3 metroj pli, ol mi volis. — *Je* oktavo pli multe. — Gratuli *je* datreveno. — Mi indignas *je* vi. — Influi *je*... — Juri *je* io. — Kalkuli *je*... — Koleri *je* iu. — Konkurso *je* premioj. — *Je* ies elspezoj. — Kvitanco *je* telegramo. — Lama *je* dekstra piedo. — Longa *je* 2 arŝinoj. — Modera *je* manĝo kaj trinko. — Senigi iun *je* lia honoro. — Paĝo *je* 20 linioj. — Paralizita *je* ambaŭ piedoj. — Tropleniĝi *je* io. — Li okupas *je* unu rango pli altan oficon ol mi. — Respondu (al mi) *je* mia letero. — Sorto estas riĉa *je* okazoj. — Tio ĉi estas signo *je* tio... — Sofo *je* ĝuoj. — Malfermi krediton *je* sumo 100 rb. — Suspekti *je* ŝtelo. — Oni taksas lian bienon *je* 500,000 frankoj. — Vigla *je* animo.

Angulo humoraja.

Kiamaniere fari barometron. Oni devas pendigi ĉe la fenestro, ekstere, mallongan ŝnuron, kaj sufiĉos nur observi ĝin — por scii staton de la vetero. Do:

se la ŝnuro estas seka — tio montras, ke vetero estas seka;

se la ŝnuro estas malseka — tio montras, ke pluvos;

se la ŝnuro estas frostigita — la vetero estas frosta;

se la ŝnuro balanciĝas — blovas vento.

Nu, ĉu ne bonega kaj preciza barometro?

Simpla maniero. Ni povas rekomendi tre simplan manieron por sen kalendaro scii, kian daton ni havas hodiaŭ; oni nur devas scii, kian daton ni havis hieraŭ kaj kia dato estos morgaŭ: ambaŭ datojn oni devas adicii kaj sumon dividi je 2. Tiel ekzemple: hieraŭ estis 5-a de majo kaj morgaŭ estos 7-a de majo — $5+7=12$; $12:2=6$ — do hodiaŭ ni havas 6-an de majo.

Ĉu ne simpla maniero?

La pruvo.

La gasto al la mastro: „Sed ĉi-tiu tranĉilo estas tute malakra!

La mastro: Malakra? Mi hieraŭ razis per ĝi mian pudelon — kaj ĝi estis tute akra kiel razilo!

Statistiko de kisoj. Antaŭ ne longa tempo mortis en London iu advokato, kiu lasis en siaj paperoj interesan statistikon — nome statistikon de kisoj, kiujn li interŝanĝis kun sia edzino en daŭro de 20-jara kunvivo. En daŭro de la unua edzec-jaro la advokato notis 36,000 kisojn, sekve preskaŭ 100 ĉiutage. En sekvanta jaro tiu-ĉi nombro malgrandiĝis je duono. En tria jaro de kunvivo por ĉiu aparta tago okazis preskaŭ 10 kisoj. En kvina jaro ili kisis unu la alian nur dufoje ĉiutage — por „bona tago“ kaj por „bona nokto“. Tiamaniere ili travivis kun si 15 jarojn; poste la statistiko notas apenaŭ de tempo al tempo la interŝanĝon de kisoj.

Ael.

Vojaĝanto en vagono ekfumis longan cigaron. Tion vidante oficisto, alproksimiĝis al li kaj riproĉis:

— Tie-ĉi estas malpermesite fumi.

— Kial? — demandis vojaĝanto.

— Ĉu vi ne vidas la surskribon:

„Oni malpermesas fumi“?

— Nu, mi ankaŭ vidas la surskribon:

„Trinku kakaon Van Houten“,

do ĉu mi devas obei kaj trinki ĝin tuj?

Respondoj de la Redakcio.

Al s-ro Ort... en Minsk. Danko por bondeziroj. La humorajon ni ne uzos.

Al s-ro Mysłakowski en Kielce. Ni dankas.

Al s-ro Włodz. Pfeiffer en Łódź. Ni dankas.

Al s-ro Julian Tuwim en Łódź. „Inviton“ de Staff ni ne ricevis. Vi bonvolu sendi ĝin refoje.

Al s-ro J. Kriss en Kraków. Dankon! Ni petas sendi al ni polan originalon de „La Betuloj“.

Al s-ro H. Kamiński en Kołomyja. Ni — bedaŭrinde — ne konas veran kaŭzon de la interesanta vin incidento.

NB. Nia nova adreso — Włodzimierska 8.

Administracjo „Esp. Pol.“ prosi p. *Miszewskiego*, księgarza w Łodzi, o uregulowanie rachunku za rok 1910.

Redaktor-Wydawca
Eldonanto-Direktoro **Jan Günther.**

Tel. 204-60.

Sekretarz
Sekretario **M. Czerwiński.**